

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Semajna

Neŭtrala



Eldonantaro:

D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administristoj:

Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekonto Köln 70663, por Teo Jung, Horrem.

Redaktoro:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fethke, H. Hurler, Max Butin.
Literatura red.: Zanoni.

Kunlaborantoj
inter la Esperantistaro de la tutmondo.

**Redaktoro de la Nürnberg-
numero:**

Prof. D-ro R. Ledermann,
Prezidanto de la Loka
Kongresa Komitato de la
XV-a Universala Kongreso de Esperanto.

Numero 112 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 26. Novembro 1922.



DISSENDANTE ĉiulanden la aliĝilojn por nia XV-a, danke kaj ĝoje ni akceptas la amindan kaj ofereman pretecon de s-o Teo Jung, eldonisto de „Esperanto Triumfonta“, konatigi la tutmondan Esperantistaron, per Nürnberg'a specialnumero, pri la estonta kongresurbo.

Urbo kia Nürnberg ja ne bezonas longan rekomendan leteron. Tamen! Same kiel ni deziras ekscii detalajn pri homo, al kiu ni donacu fidon kaj simpatian, tiel certe ŝatos ankaŭ la venontjara kongresanaro informi pri tiu „ŝtoniĝinta mezepoka testamento“, kiu povas pretendi similan interreson kiel la mond-famaj ĉefkulturoj de la klasika kulturo. Estante vera edeno por la scienculo kaj artamanto, ĝi surprizas ĉiupaŝe la fremdulon per novaj pitoreskaj bildoj kaj neforgeseblaj impresoj. La komerciston ĝi memorigas pri brila epoko de merkato kaj industrio. Kaj kiun Esperantiston ne allogos la starejo, kie vivadis niaj unuaj bonmeritaj pioniroj de la mondlingva movado, kie ankaŭ hodiaŭ laboradas enuziĝemaj samideanoj por prepari novan triumfon al nia ideo.

Esperante viajn afablajn intereson kaj simpatian, ni verkis ĉi tiun festurban gazeton por informi vin pri la ĉefaj sciindaĵoj. Ĝi estu la unua kora saluto, kiun ni sendas al niaj bravaj kunbatalantoj ĉiulandaj, la unua manpremo, per kiu ni bonvenigas vin al la XV-a.

Geamikoj! Akceptu bonvole niajn salutojn kaj alvokon kaj pravigu niajn esperojn!

Kronu la verkon!
Venu Nürnberg'on!

LOKA KONGRESA KOMITATO.

Nürnberg.

De Otto Pilhofer.

Malproksimen videbla, fiere trona kasteleto sur kruda sabloroko, du graciaj paroj da preĝejoj turoj, kiuj markas la honorindajn sanktejojn de S-ta Sebald kaj S-ta Lorenco, inter ili dommaro, superstaranta de gigantaj murturoj kaj de centoj da fumantaj kamentuboj: jen kiel Nürnberg sin prezentas al la okuloj de la fremdulo, de kiu ajn flanko li alproksimiĝas al la franka*) metropolo. La tuta karakteriza originalo de la urbo estas rekonebla tuj per ĉi tiu aspekto. Kiel neniu alia samgranda germana urbo, Nürnberg unuigas forte pulsantan modernan vivon kun la nemortemaj ĉarmoj de la pasinteco.

Savinte sin el la surdiga stacidoma buĝego, la fremdulo ekkonas la saman bildon. Dekstre kaj maldekstre grandegaj hoteloj, elektraj tramoj, ve-e grandurba trafiko, kaj jen — malsupren rigardante ĉi tiun senĉe-an malripozadon de la nuntempo — antikva turego, kiu vidis je siaj piedoj jam dekdu generaciojn ekvivi kaj malaperi. Kaj same kiel en longe pasinta mezepoko, ankaŭ hodiaŭ la vojo kondukas trans larĝa kaj profunda fosajo en la internan urbon. Ambaŭflanke etendiĝas la malnova urba fortikajo kun slaj masivaj muroj, kolosaj

*) Franklando (antikve „Franconia“) estas la norda parto de Bavario.

turoj kaj pordegoj: mezepoke romantika bildo, kia pli ĉarma certe nenie estas videbla. Kaj tiu unika vidajo, miksitaj el seriozeco kaj ĝojo, ĉiam denove aliĝas, ĉe rondpromenado ĉirkaŭ la urbo. Kaj norde, sur kruda altaĵo, impone leviĝante montriĝas la krono de la tuto, la imperia kastelo, kies turoj kaj murdejoj brilas vaste en la frankan pejzaĝon.

Tiu ĉi belegan unikan kadron respondas ankaŭ ĉiuparte la ĉirkaŭa bela kaj multera urbobildo. Kie ajn ni paŝas, ni vidas ankaŭ ĉi tie la post-ignojn de granda pasinteco. Ĉie ni postestas la regadon de fortika burĝaro, kiu el propraj fortoj kaj suvereneco agadis kaj daŭre scipovis restigi sin kontraŭ princo kaj eklezio. Nenlu severe liniigita, enuiga strata fronto. Kontraŭe, laŭ praburĝa kasta spirito, la konstruaĵoj ŝoviĝas unu antaŭ la alia. Ĉiu volas esti respektata, postulante lokon kaj reverencon al sia indeco. Altaj frontonoj enrigardas malalten en la malvastajn stratojn kaj strätetojn, mirigite pri la rapidema interpretado kaj agado de la nuntempo. La karaktero de la unuopaj konstruaĵoj estas ja simpla; tamen graciaj horetoj kaj balkonaĵoj plivigligas ĉarme la fasadon. Bedaŭre la komfortaj internaj ĉarmoj, la ege pitoreskaj kortoj restas plejparte nealireblaj por la fremdulo. Tio ĉi grandioza efikas la publikaj konstruaĵoj, la impona urbodomo en nobla renesanca stilo, la distingitaj patriciaj domoj kaj antaŭ ĉio la multnombraj belegaj preĝejoj, kiuj estante veraj juveloj de gotika arkitekturo donis al la verkado de la Nürnbergaj majstroj sanktigan senmortecon. Jen unuavice la Lorenca Katedralo, la plej bela preĝejo kun siaj graciaj turparoj, plie la belpordega, figurriĉa Madono-Preĝejo, unu el la plej vidindaj konstruaĵoj de Nürnberg; trie la Sebald Katedralo kun siaj riĉornamaj apog-kolonaj, genia por-fianĉina pordo, multaj belaj skulptaĵoj ekstermuraj kaj belega tomba monumento de S-ta Sebald; fine la historie memorinda preĝejo de S-ta Spirito, kie oni konservis ĝis fino de la 18-a jarcento la imperiajn juvelojn kaj sanktaĵojn. Arkitekture rimarkindaj estas ankaŭ la diversaj sur-Pegnicaĵoj pontoj, montrantaj la plej belajn elvidojn al la pitoreska rivero, enkadrigata per la galeriumitaj dorsflankoj de la domoj. Ni ne forgesu plie la belegajn putornamitajn placojn, kiuj vidis kelkan epizodon de iama imperiestra epoko kaj estas nekompareblaj per sia spacifiko; nek la multajn broncajn monumentojn, kiuj prezentas sin ĉie al la miganto. La belegajn madonojn kaj aliajn ĉarmajn skulptaĵojn je la domoj. Fieriga verko de germana nacikonscienco kaj diligenta eco trovis ĉi tie kompreneblan helmon: La Germana Muzeo, kiu peras plej detalan kuncentritan bildon de germana pasinteco per grandiozaj kolektoj da dokumentoj, endomaj kaj enpreĝejoj objektoj, bazonoj kaj kostumoj, pentraĵoj kaj gravuraĵoj, originaloj kaj kopioj de arkitekturaj kaj skulpturaj verkoj, kaj kiu meritas jam per si mem viziton al Nürnberg.

Sed transiru ni al la nova Nürnberg, kiu rekte aliĝas la zonan de la malnova urbo kaj montras al ni samtipan bildon pri la moderna germana urbevoluado kiel

la mezepoka Nürnberg prezentas la floradon de la iama germana kulturo. Belaj vastaj stratoj, enhavantaj monumentajn konstruaĵojn, grandegajn zorgeme kaj arte kulturatajn parkojn, vidindajn muzeojn kaj kolektojn, belegajn teatrojn kaj societelojn, modernajn vendejojn kaj magazenojn, bonegajn restoraciojn kaj komfortajn hotelojn: ĉiuj tiuj ĉi karakterizoj de grandurbo ne mankas Nürnbergon. Kaj ekstere en la antaŭurboj bruegas la laborejoj kaj fabrikoj de frumateno ĝis malfrua vespero, fumadas la kamentuboj, laboradas la maŝinoj, penadas miloj da laboremuloj, senlace produktante multvalorajn, ĉie deziratajn, eĉ en la plej malproksimaj kontinentoj.

Tial en Nürnberg kuniĝas nuntempo kaj pasinteco, ampleksante preskaŭ jarmilon. Tia urbobildo devas stimuli spiriton kaj animon, ĝojigi koron kaj okulon. Miloj kaj ree miloj da fremduloj alfluadas pro tio ĉiujare al nia antikva „Noris“. Kaj ĉi tie, Nürnberg estas unu el la plej ĉarmoplenaj urboj, kiun ĉiu klerulo devas esti vidinta kaj ekkoninta, vere inda kadro por nia XV-a.

La Historio de Nürnberg.

De D-ro Heinrich Orthal.

Nürnberg ludas tiel gravan rolon en la germana historio, tiel en politika kiel ekonomia, en konstitucia kiel kultura, en arta kiel literatura rilatoj, ke estus vanta entrepreno prezenti sur la malvasta loko de kelkaj kolumnoj eĉ nur iom kompletan bildon pri la tute eksterordinara historia evoluo de tiu ĉi urbo. La afabla leganto tial ne ĉagreniĝu, ke el la amaso de la sciindaĵoj ni elektos nur la plej gravajn, ligante ilin en pli malpli firma konekso unu al la alia.

Kiu volas rakonti la historion de Nürnberg, devas komenci per la kastelo, konstruita sur sabloŝtona roko kaj superstaranta la tutan urbon. Je la piedo de tiu paladio disvolviĝis, unue malrapide, poste per kreskanta forto kaj rapideco, la prosperanta komunumo, kiun ni hodiaŭ flere admiras.

Proporcie malfrue Nürnberg malkaŝiĝas en la historio, estante dokumente menciata nur en la mezo de la 11-a jarcento (1050). Cent jarojn pli poste, Frederiko Barbarossa, la potenca ido de la fama Hohenstaŭfa dinastio, anstataŭis la unue multe pli malgrandajn fortikajojn per majesta imperiestra kastelo, kiu ankoraŭ hodiaŭ reprezentas la solere gravan, sed samtempe ĉarmoplenan glorajn de l' urba teritorio. Ankaŭ dum la sekvanta tempo Nürnberg estas favorigita de la imperiestroj, kiuj koncesis gravajn privilegiojn al la urbo, en kiu ili prefere restadis kun sia kortego. Multnombraj pompaj princkunvenoj tie okazis kun grandstila festarango. Speciale imperiestro Karlo IV-a, apud sia amata estajo Praha, preferis Nürnberg'on al ĉiuj aliaj urboj, restadante tie ĉirkaŭ 50 fojojn. Ĉi tie li ankaŭ publik-

igis la saman ŝtatan leĝon, la Oran Dekretion, en la jaroj 1355/56.

Interne de la protektanta ringmuro jam en la 13-a kaj 14-a jarcentoj, la ekonomia, metia kaj arta vivo atingis prosperadon nekonatan dum tiu tempo en la alia germana urbo. Ĉie la Nürnberganoj estis famkonataj pro siaj kapableco, aktiveco kaj entreprenemo. La metio disvolviĝis al mirinda multflankeco kaj akiris en kelkaj profesioj mondfamon. Krom tio prosperis speciale la profesio de la komercisto, kiuj frue estigis Nürnberg'on metropolo de la komerco. Iom post iom, tiu komercistaro amasigis riĉaĵojn, kiujn ili uzis por ornami sian patruurbon per belaj domegoj kaj preĝejoj. Al tiu prosperado grandparte kunhelpis certe la zorgema ellaborado kaj perfektigo de konstitucio, konsideranta ĉiujn cirkonstancojn kaj interrilatojn kaj estanta preta esence jam en la 14-a jarcento. Dume en la komenco, la „Hohenzollern“-margrafoj regis en la urbo per militista kaj juĝa potenco, pli poste bonstataj familioj, devenantaj de la oficistaroj imperiestra kaj margrafa, ekprenis la potencon. Tiu patricia estraro defendis sin ĝis la fino de la imperia urbo kontraŭ ĉiuj atakoj de la metio kaj eĉ povis malhelpi ties daŭran glidan kuniĝon — fenomeno unika en la metia historio de la sudgermana urboj.

Certe, la ĉiamaj malpacoj kaj militoj, en kiuj la urbo estis implikita kun la nobela rabistaro kaj kun la margrafoj de la ĉirkaŭaĵo, kun la kastelestroj kaj okaze eĉ kun la imperiestroj kunhelpis, ke la urba estireco restis en firma manoj. Kvankam la postal jarcentoj plivastigis la fortikajojn, la ĉefaj partoj de la urbomuro, bone armita per fosajo, turoj kaj turetoj, jam estis konstruitaj en la 15-a jarcento. Per tiuj defendajoj la urbo estis bone protektita kontraŭ eksteraj malamikoj kaj gajnis pro tio grandmezure la konfidon de la imperiestroj. Tio estis ankaŭ la kaŭzo, ke la imperiaj juveloj, la simboloj de la antikva Roma Imperio de Germana Nacio, deposit 1424 en Nürnberg estis konservataj, ĝis kiam ili estis transigataj Wien'on en la jaro 1798.

Plej prospera estis por Nürnberg la tempo je la turniĝo de la 15-a kaj 16-a jarcentoj, kiam la urbo efektive estis la centro de la spirita vivo en Germanlando. La artoj disvolviĝis en neatendita mezuro. Eminentaj artistoj, kiel la lignoĉizisto Veit Stoss (Fajt Stos), la skulptisto Adam Krafft, la fandistio Peter Vischer (Peter Fiŝer), kaj la plej granda germana pentristo Albrecht Dürer kreis tiam siajn nemortemajn ĉefverkojn. La armetio de la germana renaskiĝo trovis tiam siajn plej eminentajn reprezentantojn; la produktoj de la iama orajmetio, vitropenitrad, keramiko, stanfandado kaj armilmetio estas ankoraŭ hodiaŭ juveloj en la Germana kaj Metia Muzeoj kaj allogiloj en la elmetoj de la multaj antikvajistoj en Nürnberg. Ankaŭ en la sciencoj kaj en la poezio la urbo disponis pri gloriaj nomoj. Ja vivis tiam la konata astronomo Johannes Müller (Regiomontanus), la fabrikanto de la unua tergloba Martin Behaim (Martin Behajm), la klera patricio Willibald Pirckheimer (Willibald Pirckhajmer) kaj fine la plej fama reprezentanto de la germana majstra kantado Hans Sachs (Hans Saks). La granda reformatoro Philipp Melancton (Filip Melanĥton), la amiko de Luther kaj „instru-

Isto de Germanujo", fondis tie en la jaro 1525 la Nürnbergan gimnazion (ĉe Agldenberg). Priskribi la verkojn kaj farojn de tiuj ĉi viroj estas tasko de speciala artikolo en tiu ĉi festgazeto.

Jen ekestis la Tridekjara Milito, kiu dezertigis la tutan Germanujon, alportante ankaŭ al Nürnberg terurajn suferegojn, speciale en la jaro 1632, kiam la plej grandaj militistoj de la tiama tempo, Gustav Adolf kaj Wallenstein, dum semajnoj kontraŭis, unu la alian en tiu regiono. Depost tiu tempo la ruinigo politika kaj financa komencigis kaj nereteneble progresis, precipe ankaŭ pro tio, ke per la eltrovo de la nova marvojo al Hindujo kaj Ameriko la iamaj enspezoj ĉesis, kaj ke la urbestroaro koruptita kaj ŝancela ne kontraŭbatalis energie la kreskantan dekadencan. La Sepjara kaj la revoluciaj militoj finruinigis la urbon.

Sub tiuj ĉi cirkonstancoj la enloĝantaro sin sentis kvazaŭ savita, kiam kun la fino de la antikva sankta roma imperio ankaŭ Nürnberg ĉesis ekzisti kiel libera imperia urbo kaj estis aneksata al la reĝlando Bavarujo. Eĉ se kelkio malnova kaj honorinda malaperis, multa bono ekestis sub la nova estro. Per la ekonomia fortiĝo de Germanujo ankaŭ en Nürnberg ree kreskadis komerco kaj industrio. La deziro al agemo en ĉiuj sferoj de la vivo revekiĝis en la laborema kaj persistema loĝantaro. Per la inaŭguro de la Ludovika fervojo en la jaro 1835 Nürnberg denove sin metas en la unuan vicon de la progresemaj germanaj urboj. Rapide Nürnberg disvolvigis al granda industria urbo, kies diversaj firmoj kaj fabrikoj gajnis internacian reputacion. Hodiaŭ Nürnberg, kiu havis en la jaro 1818 ankoraŭ 26850 enloĝantojn, estas duonmillion-enhavanta urbo, kiu kun sia mirinda miksaĵo de antikva kaj moderna tempoj prave povas esti rigardata kiel unu el la plej vidindaj urboj de Eŭropo.

Merkato kaj Industrio de Nürnberg en pasinteco kaj nuntempo.


De Max Hönigsberger.

Nürnberg de ĉiam vigle interrilatis al la tuta mondo, oni eĉ povas diri, ke ĝuste al ĉi tiu cirkonstanco ĝi dankas sian riĉecon kaj floron.

En la 13-a jarcento, kiam aliaj germanaj urboj ankoraŭ dormegis, Nürnberg jam negocadis kun ĉiuj ĉeftenoj de la Danubo kaj Rejno, kaj unuigis sin kun la fama „Hansa“, por ŝirmi la komercajn karavanojn kontraŭ atakoj de rabistkavaliroj.

En la 14-a jarcento ni trovas Nürnbergajn komercistojn vojaĝantajn al Italio, Bohemio, Moravio kaj Polio, al la flandraj urboj Gent kaj Brugge, eĉ al Sudfranco (Béarn) kaj Hungario, por interŝanĝi proprajn fabrikojn, precipe armilojn kaj kavalarajn ekipaĵojn, kontraŭ eksterlandaj produktoj.

La plej grava komerca interrilato ekzistis sendube kun Italio, kiu liveradis la spicaron de la oriento: pipron, kardiflon, cinamon, zingibron el Germanlando. Kun la spico de Hindio unuigis la produktaĵoj de araba kulturo; sudfruktoj, oleo, vino, kotono, incenso, kuraĉilaj kemiaĵoj, hindaj lignoj, purpurfarbo, eburo, koraloj, gemoj same estis interŝanĝataj kiel ledaĵoj, teksaĵoj kotonaĵoj kaj kamelharaj, natura silko, silkŝtofoj, silkaj art-teksaĵoj, oraj kaj arĝentaj ŝtofoj, kiujn komercaĵojn Nürnberg poste peradis al la Hansaj urboj kaj al Nederlando, de kie oni interŝanĝe importis haringojn, gadojn, anglajn komercaĵojn, tukojn ktp.



La Poirplaco.

Meze de la 15-a jarcento Nürnberg jam estis disvolviginta je komercurbo de internacia signifo. Grandegaj komercaĵaj stoko estis amasigataj en tenejoj kaj kavoj de privataj domoj, en doganejoj kaj remizoj. Ĉiam pli vaste etendiĝis la rilatoj de la Nürnbergaj komercistoj. Kun Nederlando, kun Brabant kaj Flandrio oni vigle internegocadis. En Francio la urboj Genève kaj Lyon estis centroj de la Nürnbergaj komerco: tie Nürnbergaj komercistoj fondis la „Germanan Frataron“. Oriente en Bohemio, Moravio, Hungario kaj nord-oriente en Silezio kaj Polio Nürnbergaj komercistoj trovis ĉiam pliĝantajn debiton, dum oni de tie akiris tolojn, alvalorajn peltojn ktp. Sed oni ne kontentigis pri nura pera komerco; multaj el tiuj komercaĵoj en Nürnberg estis prilaborataj kaj rafinataj per multnombraj metodoj, kiuj atingis mirigantan multflankecon kaj artan lertecon kaj kies bonstato videble kreskadis same kiel la etendiĝantaj komercaj entreprenoj.

Fine de la 15-a jarcento internaj malpacoj, doganaj ĉikanoj kaj komercaj malpermesoj konsiderinde malutilis la komercadon de Nürnberg. Plue, per la eltrovo de Ameriko kaj de nova mar-



Loka Kongresa Komitato de nia XV-a.

1. S-o direktoro Reiner, faktestro de la blinduloj; 2. s-o kaplano Stahl, grup- kaj faktestro de la katolikoj; 3. s-o Pillofer, l. vicprezidanto; 4. s-o D-ro Ledermann, prezidanto; 5. s-o D-ro Orth, del. de UEA kaj H. vicprezidanto; 6. s-o Hönigsberger, sekretario; 7. s-o Meyer-Kirstin, faktestro de la oficejo; 8. s-o Muscat, grupestro de la loka grupo kaj faktestro de la enloĝigo; 9. s-o D-ro Kleider, faktestro de la scienculoj; 10. s-o Meyer, faktestro por plezuraĵoj; 11. s-o Leu, grupestro de la Fürth'aj grupoj; 12. f-ino von Kienle, Komitata helpsekretarino; 13. s-o Nalb, faktestro de la akceptejoj; 14. s-o Wendl, grup- kaj faktestro de la laboristoj.

vojo al orienta Hindio, la mondkomerco ekiris tute novajn vojojn, per kio Nürnberg perdis gravan parton de sia perada komerco. Tamen ĝi ankaŭ flutempe vigle negocadis kun la sudo. Ateatas tion la fakto, ke en 1505 Nürnbergaj komercistoj kune kun Genovaj kaj Firenzaj ekipis tri ŝipojn, kiuj aliĝis portugalan ŝiparon por veturi Hindion. La permeson estis perinta Martin Behaim, kiu ĝuste tiam restadis en Lisboa kaj ĝuadis la plenan konfidon de la reĝo.


Interdume en Nürnberg ankaŭ la industrio estis prosperinta ĉiam pli fortike, precipe la metalindustrio, kiu malfermis al la komerco novan kampon de agado. Ĉar la proksima ĉirkaŭaĵo ne produktis la necesajn krudajn materialojn, oni devis importi ilin el eksterlando. La feron la Nürnbergaj komercistaro akiris el la minejoj kaj uzinoj de Bohemio kaj Stirio, kupron kaj plumbon el la Harzmontaro (Mansfeld), stanojn el la Fichtel- kaj Erzmontaro, pli poste ankaŭ el Anglio. Krom tio oni bezonis multe da aliaj materialoj kaj nutraĵoj. Sakso, Silezio kaj Bohemio liveradis lanon kaj tolon, Aŭstrio kaj Hungario grenaron kaj bovaron, Oriento kaj Nordoriento peltaĵojn, Italio daŭre spicojn. Aliflanke la produktaĵoj de la floranta Nürnbergaj meĥo en ĉiuj landoj volontege estis acetataj. Speciale la noblaj produktaĵoj de la altranga artmeĥo ĝuadis eksterordinaran bonfamon eksterlande. Ankaŭ Nürnbergaj pentraĵoj, gravuraĵoj kaj lignogravuroj estis multe dezirataj negocajo, elliranta al ĉiuj eŭropaj landoj, eĉ jam al Ameriko. Tiel Nürnberg ankaŭ en la 16-a jarcento restis unu el la plej gravaj perejoj por la eŭropa merkato.

La 30-jara milito ne plene lamigis, sed kompreneble malbonege influis ankaŭ la Nürnbergan komercon. Ne malofte okazis, ke Nürnbergaj komercistoj ricevis apartajn patentojn garantiantajn senĝenan transiron. Krome la Nürnbergaj komercistoj ĉiutempe bone atendis la laŭtempajn bezonojn. Ekzemple kiam ekestis la kutimo de fumado, en la ĉirkaŭaĵo de Nürnberg estis kulturata multe da tabako, kiu estis prifabrikata parte en Nürnberg mem, parte eksportata al Hamburg, Bremen, Nederlando kaj Tirolo. Malpli gravaj industriaĵoj, ekz. speguloj, ankoraŭ en la 17-a jarcento tradis Levantion kaj Egiption.

Konsiderinde malprogresigis, kvankam ne komplete peretigis la komercon de Nürnberg la 18-a jarcento, kiam diversaj imperiaj militoj kaj reciprokaj prikomercaj malpermesoj perforte maligis la antaŭajn rilatojn. Unuaflanke tio koncernas Francion, kien Nürnberg ĝis tiam estis liverinta

grandamase proprajn produktaĵojn kaj koloniaĵojn. Pli multe ankoraŭ malutilis la komercon la altaj transiraĵaj impostoj kaj importaj malpermesoj, per kiuj multaj registaroj klopodis akceli la industrion de la propra lando.

Pli malprosperadon rezultigis la prikontinenta blokado ediktita de Napoleono kontraŭ Anglio. La situacio estis jam sufiĉe kriza, kiam en 1834 la fondiĝo de la „Germana Doganunuiĝo“ faligis fine la malhelpantajn doganajn barojn, tiel ke la Nürnbergaj industriaĵoj denove povis trapasi ĉiujn landojn, des pli ke nun ankaŭ fervojoj kaj kanaloj plifaciligis la trafikon.



La Urbteatro.

En 1806 Nürnberg enhavis ankoraŭ 28176, 1874: 44456, 1867: 77895, 1880: 99519, 1890: 142590, 1900: 261081, 1905: 294432 loĝantojn. Hodiaŭ ĝi fariĝis eĉ duonmilliona urbo, la komerca metropolo de Bavario. Koloniaĵojn, drogojn, ladobjektojn, ludajojn, la diversajn produktaĵojn de la metalindustrio, sed precipe lupolon ĝi ekspedas al ĉiuj partoj de la mondo ĝis al la plej malproksima Oriento. Tiel la komerco kaj industrio de Nürnberg havis iam kaj havas ankoraŭ hodiaŭ internaciajn karakteron kaj gravecon!

Do, ne mirinde, ke la gvidantoj de la Nürnbergaj komercistaro, speciale la tiea Komerca Cambro ekkonas la signifon de internacia lingvo kaj apogas ĝin.

La ĝisnuna stato de la kongresaj preparoj.

De Emil Muskat.

Vi miras samideano? Vi kredas eble, ke nun, preskaŭ unu tutan jaron antaŭ la kongreso, certe ne estas jam multe da laboro por la LKK. Malprava vi estas, pensante tion. Sendube, la laboro farota dum la lastaj monatoj kaj semajnoj estos nekompareble pli granda ol la unuaj preparaj laboroj. Aliflanke ĝuste la komercaĵaj preparoj influas pli-malpli decide la sukceson de la Kongreso kaj donas al ĝi jam la postan fizionomion.

Pro tio, post elekto de Nürnberg kiel kongresurbo, ni tuj ekinterrilatis kun la urbaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj. La urbkonsilantaro de Nürnberg, la afabla invit-

into de la kongreso, esprimis siajn sincerajn kontentigojn kaj ĝojon pri la decido de la Esperantistaro okazigi la XV-an en Nürnberg, promesante samtempe aliĝi al la Patrona Komitato kaj apogi la kongreson ĉiurilate. Pri la sinteno de la bavara kaj germana registaroj ni jam hodiaŭ konfidencie povas malkaŝi, ke niaj esperoj estas tre bonaj.


En la septembra ĉefkunveno de la Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth, kiam okazis la definitiva starigo de LKK, ni havis la ĝojon saluti en nia rondo s-on Gabriel Chavel, ĝeneralsekretario de KKK. Laŭ siaj riĉaj spertoj li donis al ni multajn utilajn kaj dankindajn konsilojn pri arango kaj organizo de la kongreso. Regis plena interkonsento, kaj belharmonie kaj esperplene ni festis la „ĝefanĉiĝon inter la KKK kaj LKK“.

En la postaj ĉiusemajnaj kunvenoj la LKK detale kaj zorgeme esploris la gravajn demandojn pri templimo, kongreskotizoj kaj kongresbudgeto. Relative facile oni interkonsentis pri la templimo, 2.-8. aŭgusto. Pli malfacila estis, laŭ la nunaj cirkonstancoj, la justa fiksado de la kotizoj, pro kio ankaŭ la dissendado de la aliĝiloj lomete prokrastigis. Plej komplika estis fine la starigo de provizora budgeto. Ĉar konsiderante la valutan malstabilecon, la necertan ekonomian staton de la kongreslando kaj la nekalkuleblan nombron de la kongresanoj, ni ĉiam denove diskutadis la gravajn demandojn, ĝis kiam ni fine trovis, interkonsente kun KKK, kontentigan bazon.

Urĝe necesa ŝajnis al ni kiel eble plej vigla loka propagando, por prepari kvazaŭe varman liton al la kongreso. S-o Otto Pillofer, la bonmerita refondinto de la Kartelo kaj multsperta propagandisto, helpate de stabo da laboremaj kunlaborantoj, modele plugadis ĉi tiun gravan kampon. Grandaj aŭtoĵoj komunikis al la publiko la okazontajn, kaj en bonege vizitata publika propagandvespero s-o Karl von Frenckell, prezidinto de la XIV-a, paroladis pri la aktuala temo „La Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg 1923“. Unuanima rezolucio promesis koran bonvenon kaj akcepton de la tutmonda gastaro, kaj multege da ĉeestantoj aliĝis al la novaj kursoj, ĉu privataj ĉu oficialaj, speciale ĉe la pliperfektiĝaj kaj popolklerigaj lernejoj, ĉe la popola allernejo kaj komerca universitato, kie bonaj kaj lertaj instruistoj gvidas la kursojn. Ekestis ankaŭ specialkursoj por poŝtistoj, tramlistoj kaj policanoj, tiel ke la kongresanoj ĉiupaŝe kaj facile povos interkompreniĝi. Krome per cirkuleroj estis farata vigla propagando ĉe ĉiuj pli gravaj firmoj kaj efika lumbilda reklamo en la urba teatro kaj en diversaj kinematografetoj atentigas daŭre la publikon pri la kongreso.

La Nürnbergaj gazetaroj favore raportas pri nia afero, kaj kelkaj ĵurnalistoj eĉ jam eklernis la internacian lingvon.

Kiel idealan kongresejon ni luts — pri kio aliloke estas legeble — la vastan kaj noblan domegon de la „Kultur-Unuiĝo“. Pri kongresaj surprizoj nia eltrovema plezurestro s-o L. Meyer cerbumas tage kaj nokte. Ne perfidante lian tutan programon, ni malkaŝu nur kelkajn detalojn, por kvietigi la scivolemon de niaj ŝatindaj samideanoj. Por entuziasmuloj pri R. Wagner'a muziko estas proponita ne-oficiala naĉlingva reprezentado de la famkonata opero „Majstrokantistoj de Nürnberg“. Plue ni aŭdos en la urba teatro — se la cirkonstancoj iel permesos tion — Esperantlingve ĉu la ĉeŝatatan operon de Mozart „Edziĝo de Figaro“ ĉu iun ajn majstroverkon el la germana literaturo. Kompreneble ne mankos en la programo la tradicia internacia kostumbalo, kaj, laŭ sugesto de ĉeĥoslovaka samideano, ankaŭ



La Ĉefkongresejo de la Dekkvina. (Kultur-Unuiĝa Domo.)

Esperanta Recitadvespero (kun unuaranga recitisto) estas projektita. En nia belega naturteatro ni aranĝos grandan „Internacian Revuon de Popoldancoj“ en laŭlandaj kostumoj, kaj, se la ideo trovos la plaĉon kaj apogon de la samideano, eble internacian piedpilkuludadan konkuron, por efike propagandi nian lingvon ankaŭ en tiuj sportrondoj. En tri preĝejoj okazos diverskonfesiaj diservoj. La bonkonata predikinto en la IV-a, s-o superintendente D-ro Kühn jam deklaris sian pretecon prediki en la S-ta Lorenca Katedralo, je kiu okazos la seminariaĵoj de Aŭerbach (Sakso) donos indan koncerton. Je bona fino ni intencas aranĝi dumkongresajn ekakursitojn al la najbara „mezepoka juvelujo“ Rothenburg kaj en la ravigan pejzaĝon de la proksima „Franka Svisio“.

Do, la LKK estas plenplene okupata kaj faros ankaŭ estonte la eblon, por modele prepari la XV-an. Certe, la tasko estas ne facila, sed volonte ni dediĉos ĉiujn niajn fortojn, por kontentigi niajn karajn gastojn kaj fari la XV-an grandioza manifestacio kaj nova glora folio en la historio de Esperanto.



Monumento de Martin Behaim.

La kongresejoj de nia XV-a.

De Alfred Meyer-Kirstin.

Nürnberg, la juvelujo de Germanlando, en malnova kaj nova tempo estis prefera fest-kaj kongresurbo. Imperiestroj kaj princoj, imperiaj kuns'idoj kaj urbaj unuigoj ofte kongresis en ĉi tiuj muroj. Kantistoj, pafistoj, gimnastikistoj, farmistoj kaj ĉiujpecaj aliaj profesiuloj, ekonomiaj, artistaj, industriaj kaj metiaj asocioj volonte vizitas la vigitan kaj progreseman urbon. Ekzemple antaŭ malmultaj monatoj okazis oktaga agrikultur-teknika ekspozicio en Nürnberg, kiun partoprenis ne malpli ol 800 000 gastoj el ĉiuj regionoj; ĉiuj trovis agrablajn loĝejon. La Esperanto-ema urbestro kaj loĝantaro konsideros kiel honoran devonindeakcepti la tutmondajn Esperantistojn.

La sukceso de la kongreso estas ankaŭ per tio certigata, ke por akcepto, laboro, ĝuo kaj refreŝigo de la kongresantoj nepre idealaj ejoj estas disponeblaj.

Forlasinte la vagonaron, kongresano en la impona, impresiga halo de la ĉefstac-

domo trovas Akceptejon, kie servemaj gesamideanoj bonvenigos kaj helpos lin plenumi la pasportajn aferojn kaj trovi la loĝejon. Postlasante la stacidomon, la fremdulo, laŭ malnova Nürnberga tradicio, estos salutata per fliriantaj flagoj, inter kiuj ne mankos la verda standardo.

En distanco de malmultaj minutoj troviĝas,


lustraj prezentas belegan aspekton, dume la potenco, 25 m. larĝa kaj 34 m. profunda, moderne instalita scenejo estas unu el la plej grandaj kaj belaj de Germanio. Eminentaj aktoroj kaj kantistoj garantias unuaklasajn reprezentadojn de dramoj kaj operoj, tiel ke niaj kongresgastoj povas atendi delikatajn ĝuojn.

Post ĝuplena promenado ĉirkaŭ la pentrinda foriŝika zono de la urbo, la norde situanta **Urba Parko** kun rozĝardeno, ĉarmaj flor-kaj palmaranĝoj, verdegaj herbobedoj prezentas agrablajn restadejon. Meze de la ampleksa parko leviĝas, simile al favor-kasteleto, la restoracio, de kie la vizitanto ĝuas belan perspektivon al la lageto, la proksima fontano kaj al la najbaraj parkpartoj. Sur la pentrinda, de laŭrujoj ombrumata teraso dum varmaj somertagoj multege da vizitantoj enurbaj kaj fremdaj trinkas kafon aŭ aŭskultadas vesperon, ĉe la romanika brilo de lampoj, la allogajn melodiojn de la urba orkestro.

Dum la kongreso, unu posttagmezo estos dediĉata al vizito de la „**Dutzendteich**“ (dekdu lago), facile atingebla per tramo. Laŭ sia nomo, ĝi estas ĉarma lageto, kies sufiĉe vasta surfaco, malhele enkadrigata de pinarbareto, prezentas apartan pejzaĝan bildon. Pro diversaj restoracioj kaj banejoj tiu ĉi ekskurso estas speciale konvena por festaranĝoj. Se la somera varmege vin turmentas, la bela familia bano havigos al vi bonvenan freŝigon; se vi ŝatas la noblan remporton, vi trovos okazon por Venecia boatveturado, kaj preferante agrablajn ĉirkaŭbordajn promenadojn, vi povos rigardi gaje-viglan vivon sur la lago. Fine tutproksime de la lago troviĝas la **Urba Bestĝardeno**, kiu enhavas vidindan kolekton de belaj kaj interesaj bestoj.

Alla multŝatata ekskurso, de Dutzendteich atingebla en 1/4 hora traarbara promenado, estas la aminda monteto de „**Smaŭsenbuk**“, kiu per romantikaj ŝtonegoj, panorama turo kaj komforta restoracio precipe posttagmeze estas agrablige restadejo. Novkonstruita **Naturteatro**, skulptita el la ruĝaj sabloŝtonegoj kaj superŝarata de belegaj arboj, estas vidindaĵo unuaranga, same ruzete aranĝita „**Labirinta Ĝardeno**“, en kiu kelka kongrespareto agrable povas pasigi la tempon...

Kiel montras ĉi tiu mallongarevujo, en Nürnberg ne mankas ejoj, kiuj prezentas indan kadron por la laboroj kaj por la plezuraj de la kongreso. Venu do, amikoj de malproksime kaj de proksime! Vi baldaŭ sentos vin hejme



Bildo el la Urba Best-Ĝardeno.

ece kaj kunprenos la plej agrablajn rememorojn.

Mondfamaj Nürnberg-anoj.

De D-ro Wilhelm Eberle.

Krom multnombraj aliaj preferoj Nürnberg dankas sian mondfamon ne laste al la famkonataj homoj, kiuj vivis en ĉiuj muroj kaj kiuj per ĝia eminenta verkotekniko por ĉiam povas postuli honoran lokon en la kulturhistorio de la homaro. Certe, kara leganto, vi jam aŭdis ion pri unu aŭ alia fama Nürnbergano; des pli multe eble vi havas interkonsenton ekkonatiĝi ankaŭ kun la aliaj ĉefaj spiritoj Nürnbergaj.

Jen antaŭ ĉio estas ĉiinda **Martino Behajm** (1459—1506). Tiu ĉi vera landrato eĉ farigis maristo. 1487 ni trovas lin en Lisbono, kie akceptita en la „Junta dos matematicos“ li estis pliboniganta la navigadon. Travolaĝinte multajn landojn kaj marojn, li revenis en sian gepatran urbon kaj tie i. a. faris la unuan grandan tergloban modelon, kiu ankoraŭ hodiaŭ prezentas multe admiratan vidindaĵon en la „Germana Muzeo“. Ĉe domo sur la ĉefa foirego vi vidas la bildon de tiu ĉi granda kosmografo, sur la Theresia-Placo lian monumenton.

Kvazaŭa antaŭulo de M. Behajm estis la matematikisto kaj astronomo **Regiomontanus** (1436—1476). Ankaŭ li estis vidinta la urbojn de multaj homoj. 1471 venis Nürnbergon, tie starigis la unuan germanan observatorion, famkonatan presejon kaj laborejon por fabrikado de astronomiaj instrumentoj, per kies perfekteco la grandaj eltrovoj eksterordinare estis akcelataj.

Se la forto de Regiomontanus pli multe troviĝis sur la matematik-astronomia kampo, la sciencisto **Vilbaldo Pirkhelmer** (1470—1550) enkorpiĝis la ĝeneralan scisopiron de sia tempo. Dum multaj jaroj ano de la magistrato de sia urbo kaj ofte komisiita per gravaj misioj, li dediĉis siajn lastajn vivjarojn ekskluzive al la sciencoj; li estis unu el la plej influhavaj ĉefoj de la humanismo kaj akiris grandajn meritojn rilate al la Nürnbergaj lernejoj aferoj. Parto de la granda ringstrato hodiaŭ havas la nomon de la fama homo.

Se la ĉiitaj tri Nürnberganoj estis reprezentantoj de la scienco, la sekvantaj estas veraj adeptoj de la arto. La majstro de la lignocizilo **Vejt Stoss** (1450—1553) aperas 1496 en Nürnberg. Kiel ĝis tiam en Krakovo kaj Gnezn, ankaŭ ĉi tie li disvolvis neordinarajn fruktodonan laboron, farante ligno-gravurajn altarojn, grupojn kaj unuopajn figurojn. Multe admirata ornamajo de la Laurenca Katedralo speciale estas la „Angela Saluto“, prezentanta la Anunciacion.

Simile laboris la skulptisto **Adamo Kraft** (1440—1507). Sian povon li pruvis per multnombraj tombejaj monumentoj kaj reliefoj, inter ili estas liaj famkonataj „sep stakoj“. Lia ĉefa fariĵo estas 21 metrojn alta, laŭ plej abunda gotiko efektiva kaj per multnombraj figuroj surigita nekompareble bela „Sakrament-domo“ en la Laurenca Katedralo, kiu tian nomon tutmondfamigis. Ĉe la piedo de la mirakla verko estas lia propra bildo kiel latviva figuro.

La eksterordinara specialeco de **Petro Vischer** (1460—1529) estis la bronzfandado. Devenante de skulptista kaj bronzfandista familio, kiu dum tri gene-



Pejzaĝa bildo de „Dutzendteich“.

racioj estis farinta valoran laboron, li disvolvis miregindan multflankecon. Krom tombomonumentoj en Magdeburgo kaj Breslau lia mano kreis la famekonatan trege riĉan kaj fantaziplenan „Sebaldu-tombon“, kiu reprezentas ne nur eminentan ornamajo de la Sebalda Katedralo, sed laŭ la juĝoj de la artritikiistoj ankaŭ la plej valoran sanktaĵon de la germana arto entute. La majstro finis la verkon kune kun siaj kvin filoj post dektrijara laboro kaj eternigis sin mem en la verko kun antaŭtuko kaj skulptilo. La verko prezentas tomban preĝejon, artplene fanditan el bronzo, en kies interno troviĝas la ĉerko kun la ostoj de la sankta Sebaldo. Kiu arthistoriisto senatente povus preferi ilin el majstran fariĵojn, kiu diakonikoj la famon de sia kreinto pli bone ol la simpla memorig-tabulo ĉe lia lama domo en la Petro Vischer-strato!

La arto de **Petro Henlein** (1480—1542) estis en alia kampo. La monumento sur la Helfner-placo reprezentas la majstron en lada ĉapeto kaj antaŭtuko, rigardantan kun flera kontento unu el siaj mondfamaj „Nürnbergaj ovojn“, (ovformaj poŝhorloĝoj). La soklo de la puta monumento sur kiu staras la famekonata horloĝisto, ilustras al ni la formon de tiuj ĉi unuaj poŝhorloĝoj.

Kaj nun al la plej granda ido de Nürnberg: **Albrehto Dürer**! Ne vane la mezepoka domo ĉe la „Tiergärtnerpöcher“ kie tiu ĉi majstro de la kraĵono kaj de la koloro vivis kaj laboris, ĉiutage estas la pilgrima celo de miloj da fremduloj. La multflankeco de Dürer kiel artisto estas preskaŭ senekzempla: li ne nur estis pentristo, gravuristo kaj desegnisto por la lignogravuro, sed li scis ankaŭ arkitekturon kaj skulptarton. La plej grava fariĵo de la artisto krom aliaj famekonataj verkoj, ornamantaj la pentraj-galeriojn de la mondo, estas la belege vivgrandaj figuroj de la kvar evangeliistoj, en kiuj la majstro atingis la plej altan perfektecon de sia arto. La povon de Dürer ankaŭ atestas tiu cirkonstanco, ke el la 8000 kapoj, kiujn li desegnis, neniu egalas al alia. La korpaĵoj de tiu ĉi genia homo ripozas sur la fama Johano-tombejo aŭ simpla metelplato; tute proksime de la Sebalda Katedralo staras lia bronzfandita monumento.



Monumento de Hans Sachs.

En la sama tempo, kiam bronzfandistoj, skulptistoj, lignogravuristoj kaj pentristoj ornamis la malnovan Nürnbergon per nemortemaj laboroj, honorinda botisto faris versojn kaj ŝercojn. Tiu estas la plej originala persono de Nürnberg: **Hans Sachs** (1494—1576). La simpla botisto estis la plej bona majstrokanoniko de Nürnberg kaj la plej granda poeto de Germanujo en tiu tempo. Liaj nomoj kaj memoro mondfamigis per la fama opero de Richard Wagner „Die Meistersinger in Nürnberg“, kaj la temperamenta, precize observanta, aprita maniero de la Nürnbergo botisto-poeto restas antaŭ ĉio por la germanlingvaj popoloj gaja heredaĵo. Proksime de lia multvizitata domo, la dankema gepatra urbo en la kvarcenta jubileo de lia naskiĝo starigis sencenpan monumenton.

Pasintaj tempoj, vi diras, kara leganto. Certe! Sed ankaŭ en la pli nova tempo ne mankis al Nürnberg kreemaj homoj. Tiuj estis homoj de la praktika laboro, kiuj deveninte de malgrandaj kaj plej malgrandaj vivkondiĉoj, meze de bruantaj mariloj kaj silbantaj maŝinoj, kreis industriajn entreprenojn mondfamajn, kiuj denove honorigis la nomon de Nürnberg.

Kiu ajn ne jam aŭdis pri **Faber-kraĵonoj**? **Lothar Faber** (1817-1876) en Stein apud Nürnberg grandaile perfekte legis la kraĵonfabrikejon, starigita de lia antaŭulo, fonda proprajn cedrarojn kaj akiris grafitproduktejon en Siberio. Tiamaniere lia senripoza komercista diligenteo sukcesis fondi tutmondan faman firmojn, hodiaŭ havantan filiojn en ĉiuj kulturlandoj de la terĝlobo. Malgraŭ la

(Daŭrigon vidu sur la kvina paĝo!)

en la belega „Kulturunuiga Domo“ (Kulturvereins-haus), la ĉefkongresejo, destinita por la solena malfermo, la grandaj laborokondoj, internacia bala kaj aliaj festaranĝoj; ĝi estas entute la komuna renkonto de la kongresanoj. En tiu ĉi nobla konstruaĵo, kvazaŭ kreita por grandstila aranĝo, estas luksa festsalono, ampleksanta ĉirkaŭ 7000 personojn, krome diversaj grandaj kaj malgrandaj salonoj, kafejo, vinejo kaj bierejo, dume en la apuda ombrumata koncertĝardeno la samideanoj ĉiuhore povos promeni kaj gaje babiladi.

Tute proksime, inter Akceptejoj kaj Ĉefkongresejo, troviĝas la **Urba Teatro**, kiu ludos apartan rolon en la plezurprogramo. De malproksime videbla pro sia superŝaranta kupolo, masa kaj firma laŭ ekstera aspekto, la konstruaĵo ampleksas ĉirkaŭ 2000 komfortajn sidlokojn, el kiuj 800 estas en la pargeto, 200 en la unua rango kaj la ceteraj en la 2-a kaj 3-a rangoj. Enkadrigataj per blanka kaj griza marmoro, la nobla promenejo kaj vestiblo kun siaj vastaj speguloj kaj brilantaj

Karlsbad (Ĉeĥosl.)

Grand Hotel PUPP

— Centro de la kuracbanejo vivo —

Jus aperis la libro en Esperanto:

Milionoj, kiuj nun vivas, neniam mortos!

Tiu ĉi libro ĉu vera Esperantisto devus legi, ĉar ĝi proklamas la plenumon de la „Interna Ideo“ kaj de la starigo de la de ĉiuj pacemal homoj alskriptata eterna Regno de ĉiama paco. La klarigo en ĝi superas ĉiujn homajn esperojn kaj deziraĵojn kaj la proklamo koncernas ĉiujn homojn. Mendu ĉe:

Esperanto-Librojo Alfred Egg, Rieden b. Baden, Svislando, Landstr. 277.	Prezo: gmk. 300.— sv. fk. 1.— fr. fk. 2.—
Varietormin Toimisto, It. Viertolle 6, Helsinki, Finnlando.	dol. —.25
S-o J. D. Sayers, Evening Post, 20, Vesey St., New York.	sh. 1/—
P-lno Avila Julia Wells, 1 James St. Park Lane, Keighley Yorkshire, England.	

Petu nepre proponon pri la artaj

MANBRODAĴOJ

ledobjektoj, pupetoj, skatoletoj hungaraj!

Malkaraj! Taŭĝaj donacoj!

Paŭlo Balkányi, Budapesto VI, Hejso 15 (Hungarlando). — Por revendiĵoj bona okazo!

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj per minimume du alnekvaj emprosoj) kostas po du emprosoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso) 0.20 dol., 0.40 jeno, 0.50 kr., 1 nord. kr., 1 ill., 1 avis. fk. 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 2 esk., 5 lir., 6 kc., 7 mk., 10 din., 18 lejoi, 18 lejoi, 400 gmk., 300 hung. kr., 1000 pmk., 5000 aŭstr. kr. Ĉiu povas pagi per la alin el la nomitaj valutoj, sed laŭ la aktuala kurso de sia propra valuto, aŭ 5 stamp. resp. -kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi eĉ alvaloro de 2 franc. fk. Ĉe rektaj abonantoj ni deprezas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonanto, de aliaj ni enprezas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas elveni 10 tagojn antaŭ publikigo. — Aŭstrajn monbiletojn ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli, polajn de 100 mk. aŭ pli.

ESPERANTO KOMERCISTA GRUPO

Dresden-N., Hauptstrasse numero 38.

● ● ●

Plej granda Esp.-komerca entrepreno serioze laboranta, perdas ĉiun komercan aferon. Postulu nian plej novan oferton kun multaj Esp.-lingvaj prospektoj. Ni rekomendas speciale ludilojn, mantrikajn kovraĵojn, pantalon-porcelojn, ŝubindilojn, kartonaĵojn, kalendardorojn, murbiletojn kaj tiel plu.

● ● ●

Specialaĵo: „Speton“-gardrimedo, grava por virinoj! — Specimentabulero 100 mk.

EDZIĜO. S-o Ivor Szilágyi kaj semideanino Enjo Kléaz geedziĝis en Ĉiuj.

„**BATAVO**“, internacia, porkoresponda, porinterŝanga societo, la sola eldonanta belegan ilustritan organon, redaktitan en tri lingvoj (Esperanto, franca kaj germana). Malaltaj abonprezoj. Por ĉiuj aliĝontoj senpage unua anonco (15 v. rtoj), diversaj loterioj, konkursoj ktp. Delegito en Ekstereŭropo serĉata. Demandu informojn, prospektojn aŭ specimenajn gazetojn (po 40 markoj germ. aŭ 1 franko por bonvalutaj landoj) ĉe s-o Hans Wolf, Hahnstr. 60, Stuttgart, Germanujo.

RUSIAJ SAMIDEANOJ! Kiu el vi povas nin informi pri la sorto de mia brafato Eduard Garlier, militkapita aŭstro kies lasta adreso estis: Sellremove, Jenotajcska, Astrahan? Li laboris sur bieno kaj veturis laŭdire printempon 1918 en la barakaron Wologan (?). Skribu al s-o Jur. Dolf Halbedl, Graz, Schulgasse 24, Aŭstrujo.

AŬDANTE, ke mia lernanto skolto Arne Andersen, Grenaa, Danlando, estas malsana, mi petas skolifratinojn mallongigi la severan tempon sendante al li poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

FINNA SPORTEVUJO. Esperanta numero okazis de la XIV-a 24 p., 29.5; 21.5 cm. Prezo: 2 validaj resp.-kup. aŭ monbiletoj laŭ valoro de 1 fk. Adr.: Suomen Urheilulehti, Helsinki, Erottaja 4. — Ĝi priakribas en riĉe ilustritaj artikoloj de eminentaj specialistoj gravajn sportofakojn en Finnlando, la unua sportilando en Eŭropo. La sola Esp. prisporta eldonajo.

INGENIEROJ-ARKITEKTOJ! Instruu min, konstrui domon el argilo. J. Grünthal, postk. 15, Haapsalu, Estonio.

FUNDAMENTO DE ESPERANTO de D-ro L. L. Zamenhof kun universala vortaro kvinlingva, ankaŭ uzitaj dezirataj aceli Gregoro Lempert, Riga, Latvio, Skolas iela 4.

ELDONANTOJ de Esp. libroj kaj gazetoj estas petataj sendi po du ekzempleroj de ĉiu nova Esp. eldonaĵo al s-o K. Strazde, del. de UEA, Jelgava, Latvio, Zala iela 18. La pago montrita estos sendata ĉiam tuj post la ricevo de la sendaĵo.

NÜRNBURG-AJ GESAMIDEANOJ! Partoprenonte la XV-an mi dezirus korespondadi kun vi. **Johano Della Savja**, Via di Toppo 11, Udine (Italio).

Aboneloj de ET

en la landoj

Aŭstrujo: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg; por Vieno: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeiffer), Wien II/1, Postami 24.

Belgio: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraal, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 28450.

Brazila: Brazila Ligo Esperantista, Praça 16 de novembro, Rio de Janeiro.

Bulgara: Georgi Fr. Ganevski, Bul. Maria Luiza 46, Sofia.

Ceĥoslovakia: Otto Škrtička, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.

Estona: Est. Esp. Unuigo, poŝtkat. 6, Tallinn.

Finna: O/V. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

Francia: Esp. Centre Librejo, 81 rue de Cligny, Paris 9.

Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalán.

Hungara: Paŭlo Balkányi, Hejso-utca 18-II-2, Budapest VI.

Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.

Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.

Latvia: Talivaldo Indra, Riga, Pasta kaale 478.

Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaŭna (Kovno).

Nederlanda: J. Ravestein Jr., v. Aersensstraat 200, s-Gravenhage. (Poŝt-ĉeka konto Haag n-o 2878.)

Pola: Adolfo Oberholzer, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P.K.O. n-o 3128). — Pola Esp. Servo (Fr. Prenege), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.

Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. B. U., Moskvo, poŝtkonto n-o 620.

Sveda: Förtägarörningen Esperanto, u. p. s., Stockholm 1.

Svisa: Esp. Librejo „Verda Stelo“, Rosenheimstr. 5, St. Gallen-Ost.

U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New York City.



**Internaciaj Foiroj
de
FRANKFURT a. M.**

Survoje al Nürnberg!

Printempa Foiro 15.—21. aprilo 1923.
Autuna Foiro 22.—29. sept. 1923.

Petu detalojn kaj presajojn en Esperanto de
**Messamt, (Esperanto-Fako)
Frankfurt a. M., Germanlando.**

„La plej belaj vidindaĵoj de Francujo.“

Belartaj artistaj albumoj, lukse eldonitaj sur Bristol-papero kaj reprezentantaj la plej agrablajn rememorojn pri Francujo. Jam aperis kun klariga teksto france, angle, hispane kaj Esperante (traĉuko de E. Arch-deacon): 1. Paris, 2. Versailles, St. Germain-en-Laye kaj Malmaison. Ĉiu albumo enhavas 48 belegajn helio-gravurojn. Prezo: 40 fr. fk. kun kartona kovrilo; 50 fr. kun tola kovrilo; 60 fr. kun leda kovrilo. Por la sendkostoj aldonu 10%. Ĉiu mendo estas antaŭpagata. Adresu ĉion: Editions d'art L.-J. Patras, 72, rue Vasco-de-Gama, Paris XV-e.

Grava Novaĵo! Sendu sviz. fk. 3.50 aŭ samvaloron (monbiletojn aŭ ĉekojn) en rekomendita letero al sinjoro Zullo Sante, presso Buonamano Salvatore, Corso Regina Margherita 258, Torino (Ital.) kaj vi ricevos per rekomendita letero mirigajn novaĵojn, tio estas la „Eterna Notes“ (Nolibro). Ne bezonas nek inko, nek kraĵono, sed sufiĉas simpla skribilo. — La skribilo ne plu servanta nuligas sin, se oni uzas la gumon. — Un-versala adopto, necesege per oficejoj! Diskonto al revendistoj.

POR KRISTNASKO ni rekomendas:

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof. Inda memolibreto, presita sur luksa papero, kun multaj ilustraĵoj laŭ originalaj fotoj. Taglibro de vilaĝpedelo. Interesa romansimila rakonto. De la dana verkisto Blicher. Tradukita de s-ano Bulthuis, L. K.-ano. Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. Oni ridas. Bela kolekto de veraj perloj de bonhumoro kaj sprito. De s-ano O. Rieck. Rekomendita de Esp. Lit. Asocio kaj reviziita de Zanoni, literatura redaktoro de ET.

La prezon legu en aliaj numeroj de ET aŭ demandu ĉe la eldonejo
Budin & Jung, Godesberg, Germanlando.

„Chwoika's Pilsner Bierstube“

Pilsen-Biertrinkejoj de Chwoika

Karlsbad (Ĉeĥosl.). Hauptstrasse, Domo „Engländer“
Renkontejo de la kuracgastoj kaj pasantoj.

Specimenojn
kaj embala-
gojn de

Esperanto-Komercadoj

interŝanĝas kaj kolektas
por dumfoira ekspozicio:
Ligo de germ. Esperanto-
grupoj en Ĉsl., Reichen-
berg, Klotildenstrasse 6.

KIEL VI ASPEKTAS??

Ĉion vidos viaj korespondantoj, se vi sendos al ili vian foton!!

Laŭ multoblige vian portreton!

Mi estas pli malmultekosta ol via fotografado. — Plej modera aktualaj prezoi! — Representantoj en ĉiuj landoj serĉataj!

— Arta Laborejo por Amasaj Multobligejoj —
Ferna Versand, Plauen i. V., Germanl.

Mi serĉas fabri-
kon, kiu povas
livri grandajn
kaj mezgrandajn
terpom-
kuirilojn

por la farmistoj.
Firmao L.
Mammen,
Grenaa.
DANLANDO.

**Mi vokas vin per la fajfsignalo
Vivu Esperanto**

Marŝo Esperantista de A. Menzel.

Eldonoj: Por fortepiano gmk. 50.—, violono kaj fortepiano gmk. 75.—, ĉlro gmk. 40.—, malgranda orkestro gmk. 120.—, granda orkestro 240.—. Por la bonvaluta eksterlando duobla prezo. Sendkostoj 10%. Mendo ĉe:
G. Menzel, Leipzig-Gohlis, Menckestrasse 14, Germ.

Cigar- kaj Tabakfabrikejo Mühldorf a. Inn,
Oberbayern, Germanio.

Ni serĉas komisionojn eksterlandajn por niaj fabrikoj. Al agentoj altajn procentojn. Prezoi malaltaj. Eksterlandaj firmoj bonvolu tuj postuli proponojn.

TOLAJ- KAJ TEKSAJ-MAGAZENO.

Pianĉin-ekipaĵoj. Sinjoraj ĉemizoj laŭ mezuro.

FRATOJ NASTOPIL, KARLSBAD (ĈEĤOSL.),
ALTE WIESE, HAUS „NASTOPIL“.

**Gastejo - Kafejo - - Sukeraĵejo
„FRANZENSCHÖHE“
Franzendorf apud Reichenberg (Ĉsl.)**

kvin minutojn de ĉefstacidomo Reichenberg. En la proksimeco veturilsanĝo de la elektra tramo (linio Jesken, 1010m). Somere plej belega, ombra ĝardeno en senpolva situacio. Koncertpianino kaj orkestro. Vizito petata. Esperanta gazetaro. Renkontejo de ĉiuj ge-Esperantistoj. Oni parolas kaj korespondas Esperante.

Ferdinand Kaülfers, Vicd. UEA, mastro
kaj Ferd. Gahler, sukeraĵisto.

Restoracio kaj Kafejo

„Stadtpark“

Karlsbad (Ĉeĥosl.). Alois Pothorn, restoraciestro.

Ĉiuvespere koncertoj.

PROPAGANDO!

Ĉiun eldoniston de Esp. revuo aŭ gazeto mi pelas por propagando de Esperanto en la nova respubliko Latvio, nepre sendi al mi po 1 ekzemplero de ajna n-o 1922-jara de sia eldonaĵo, notante la prezon pagotan. Mi prenos sur min la kolektadon de abonoj por 1923 j.; donu vian kondiĉojn. Talivaldo Indra, del de UEA, Riga, Latvio, Eŭropa. P. k. 475.

PROPAGANDO!

Postulu

se vi volas havi la aŭtentikan kaj sole veran
Karlsbad'an
amaran akvon, nepre la leĝe enregistritan

Becherbitter

de la firma Johann Becher, Karlsbad (Ĉeĥosl.) kaj
**rifuzu ĉiujn
imitaĵojn**
de mia mondkonata specialaĵo.

Esperanto kun BES-a Adresaro

estas

nova kaj feliĉa paro

kiu amikigas trans monto eĉ maro.

Informoj: Bohema Esperanto-Servo,
Moravany Ĉeĥoslov.

Grebe & Kästner,

Dresden, Arnoldsir. 10, fabriko de petrolo-kuiriloj kaj kandelinoj el aluminio. — Demandu prezojn.

Ĉefa Foiro Köln, S-ino Anna Hebing, Köln

ĉetas kaj vendas pogrando: buteronojn, fromaĝon, grasojn, kondensitan lakton. Posedas oficialan permeson depost 18.5.22. H. n-o 608 de la urbo Köln.

Business Men!

ESPERANTO will help you
to extend your business

You can learn to
read, write, and speak it
in a few weeks
by the aid of

Pitman's Commercial Esperanto
by W. M. Page

Price 2 s 6 d.

Sir Isaac Pitman & Sons, Ltd., London
and all booksellers.

Hotel PARADIES Karlsbad

(kontraŭ la Kuracdomo)

Instalita laŭ plej moderna komforto
(Ĉeĥoslovakio)

Por ĉiu homo estas utile scii la signifon de sporto, kompara kun fizika laboro. Tion klarigas la verko

„La malbonaj flankoj de sporto“. 1 ekz. kostas 1 franko 0.75 fr. — 1.25 fl. — 2 kē. Kun verkistoj k. eldonistoj mi ank. Interŝanĝas ĝin kontraŭ iliaj eldonaĵoj Esp. J. Vahtrik, Luksentall-11, Tallinn, Est.

Grava firma ĉetas — vendas — interŝanĝas poŝmarkojn por kolektoj, flatelaj objektoj, albumojn de artaj pentraĵoj, panoramojn, novaĵojn ktp. — Akceptas abonojn al ĵurnaloj kaj revuoj kaj reklamojn por ĝi. — Malkaraj prezoi! — Oni korespondas Esperante kaj france. — Zullo Sante, Via Ospedale 2, Torino 1, Ital.

Tolo Posed. M. Probst, Dresden-n, Germ.,
Königsbrückerstrasse 4.

Fabriko de tag- kaj nokteĉemizoj.
Liverado al la eksterlando! — Representantoj serĉataj.

SUKERAĴEJO
KAJ OBLATPRODUKTEJO HANS DEUTZER
KARLSBAD, (ĈEĤOSLOVAKIO)
Oni sendas dum la tuta jaro.

L. RETTENMAYER,
WIESBADEN-MAINZ, FONDITA 1842.
Ekspedo, transportoj per veturiloj kaj aŭtomobiloj. Transporto de meblaro: eksterlanda kaj transoceanaj ekspedo. Transleto. Deponejoj kun areo de 25 000 kvadr. metroj. Vojaĝoficejoj, Stpagentejoj.

Eau de Cologne,
Parfumo, Tuaelettoj ktp.
Aug. Junker, Köln a. Rh., Hohestrasse 26, Germ

ESCEPTA NOVAĴO!
Nova kunigaĵo patentita por bicikletaj kaj motorcikletaj pumpiloj. Anstataŭas perfekte la guman kunigaĵon. Granda solideco. Longedaŭra. Vastega sukceso! — Aŭfrankite sendu po sviz. fk. 5 (aŭ papermonon, -ĉeko) per rekomend. letero al s-o Zullo Sante, presso Buonamano Salvatore, c. Regina Margherita 258, Torino (4), Italujo.
Diskonto al revendistoj!

GRAND HOTEL

Fratoj Hanika
Karlsbad (Ĉeĥoslovakio)
kontraŭ la kuracdomo

Plej multe vizitata restoracio

Mondkonata kuirado

Karlsbad'aj Bayer-Oblatoj
depost 1867 la plej bona deserta bakajo.
Karl Bayer, Karlsbad (Ĉeĥoslovakio).

La semajna, interna kaj neŭtrala „Esperanto Triumfonta“ kun senpaga monato „Revuo“ estas la plej grava gazeto Esperantista.

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finigonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. Germanoj abonu ĉe sia poŝtoŝeĉejo.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 800 Kr.	Ceĥosl. 1.20 Kr.	Hungara 30 Kr.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 40 Gmk.
Belga 0.50 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.70 Lit.	Norvega 0.50 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Brita 3/4 Pc.	Franca 0.50 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Pola 1.20 Mk.	Svisa 0.50 Fk.
Bulgara 3 Levovj	Germana 80 Mk.	Jugosl. 1.80 Din.	Portug. 0.50 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.
Dana 0.20 Kr.	Hispana 0.50 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Rumana 3 Lei.	

Balilkanoj demandu la prezon ĉe sia Abonejo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 ŝtampitan Respond-Kuponon.

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 5. Por Adresŝanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 40 gmk.); rabato laŭ interkonsento.

„Esperanto Triumfonta“ estas la oficiala organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto, Nürnberg 1925.

ADRESO DE LA ADMINISTREJO: HORREM BEI KÖLN, GERMANLANDO.

(Fino de la artikolo „Mondfamaj Nürnberg'anoj“ el p. 3.)
negoca fervoro, li ne forgesis la bonon kaj malbonon de siaj laboritoj, kiuj en la najbara urbo Stein starigis al li monumenton.

Ankaŭ la nomo Schuckert en la tuta mondo sonas bele. Sigmundo Schuckert (1845—1895), la fondinto de la famekonataj Schuckert-elektraj produkciejoj suprenlaboris sin el malgranda komenciĝo Post restado en Ameriko (i. a. en la laborejo de Edison) li fondis en Nürnberg propran negocon, kiu baldaŭ prosperis ĝis alta floro. Li konstruis dinam-elektran maŝinon, multenombrajn aliajn elektrajn aparatojn, aŭtomatajn polurmaŝinojn, superintalan per efiko ĉiujn antaŭajn kaj disvastigintajn ĉe preskaŭ ĉiuj nacioj.

Pri Ignacio Bing (1826—1918) oni rakontas, ke veninte Nürnbergon sian havon li povis meti sur puŝveturilon. Per siaj nelacigebla diligenteo kaj vigla entreprenemo li sukcesis krei el modesta negocojo mondfirmon, fabrikantan ĉiujn ajn produktaĵojn kaj posedantan multnombrajn filiojn en- kaj eksterlande.

Preskaŭ samtempe kun la unua germana fervojo Nürnberg-Fürth (1855), konstruita de la Nürnberga inĝeniero Vilhelmo Späth, estis fondita la fama firma „Maŝin-fabriko Augsburg-Nürnberg“ de Johano Frederiko Klett (1778-1847). Helpate de anglaj maŝinkonstruistoj kune kun siaj bofrato Teodoro Kramer kaj merita kuns-laboranto Ludoviko Werder li kreis grandaŭtoman entreprenon, kiu sur la kampo de la veturil-, altfer-, pont- kaj ĉiujn ajn maŝin-konstruado liveras eminentaĵojn.

Tiuj homoj, pri kiuj ni parolis ĉi tie en mallonga skizo, ĉiuj mortis delonge, sed iliaj nomoj restos nemortemaj. Estas ili, kiuj fondis la famon de Nürnberg, ne nur en sia patrujo, sed ankaŭ ekstere en la vasta mondo, tiel ke ne malprave la amerika poeto Longfellow pri tiu urbo povis kani:

„Famkonata per fervoro kaj komerco
Kiel per artistoj kaj poetoj.“



La Kasteio, vidata de sudo.

Nürnbergaj specialaĵoj.

De D-ro Emilio Reicke.

Nürnberg'on kiel tutajn oni povus nomi specialaĵoj inter la germanaj urboj, laŭ tio, ke mirinde rondigita ĝi prezentas kvazaŭan ŝtonigintan testamenton de la meza epoko. Tamen unuope certe ankaŭ aliloke okazas troveblaj ĝiaj majestaj preĝejoj, balkonaj-ornamitaj domoj, oblikvaj angulhavaj stratoj, pentrindaj pontoj, meditahtigaj placoj kun plaŭdantaj putoj. Sed kio eĉ ĝin faras unika en la mondo, tio estas ĝia mezepoka fortikejaro, en vasta rondo ĉirkaŭanta la urbon kaj malgraŭ sia preskaŭ 500-jara ekzistado ankoraŭ hodiaŭ plej grandparte sendifekte konserviĝinta. Kiel karakterizaj ekkoniloj, ja kiel ĉefaj ekkoniloj de la urbo siaflanke povas esti konsiderataj la kvar grandaj rond-turoj ĉe la kvar ĉeffrontoj. Kolosaj malcedemuloj kun preskaŭ 20-metra diametro kaj ĉirkaŭ 45-metra alto, kun dikaj, rondaj ŝvelaĵoj ĉe la kolo kaj kun multe ekstremitaj kaskosimilaj suproj jen ili staras kiel gigantaj gardistoj, kirasumitaj ĝis la mentono, al ĉiu malamiko malpermesontaj enurbigi. En la meza epoko, kiam ankoraŭ ekzistis „bellum omnium contra omnes“ (batalado de ĉiuj kontraŭ ĉiuj) bonajn servojn ili faris al la Nürnberga urbanaro dum la batalado kontraŭ malpacemaj najbaroj, ambiciaj princoj kaj rabema nobelularo. Certe tiuj ĉi tempoj delonge estas pasintaj, kaj se ni suprenrigardas al la kolosaj turgigantoj, ŝajnas al ni, kvazaŭ ni legas en antikvaj fabeloj kaj kavaliraj romanoj. Mirante ili malsuprenrigardas al la rapidegado kaj pelado de la hodiaŭa homaro kaj ankaŭ la hederumitaj malnove-grizaj muroj prezentas bildon de plej granda paco.

Mondon apartan formas la kastelo, kiu supre regas la urbon sur superstaranta altaĵo kaj ampleksas imperiestran restadejon, ĉambrojn, balkonojn, kortojn, provizajejojn kaj stalojn. La malĝoja kvinangula turo, la mirinda, gracia rond-turo kaj la kolosaj antaŭkuŝantaj bastionoj jam de malproksime sin vidigas, kiel aliflanke de el la kastela liberejo oni ĝuas nekompareble belan perspektivon al la malnova kaj nova Nürnbergo. Supre sur la parapada remparo en la direkto al la nordo oni montras al ni du profundajn enfos-itajn truojn, devenantajn laŭdire de l' ĉevalo de la rabista kavaliro „Epplein von Gaillingen“. Tiu ĉi laŭ la rakonto enfalis la manojn de siaj

malamikegoj, la Nürnberganoj, kaj, nun laŭ ordono de la magistrato en la kastela korto ĉe alta pendigilo estis pendigota. Ĉiuj preparoj jam estis aranĝitaj, kaj granda homamaso alpremegiĝis, por kontentigante ĉeesti la spektaklon: La malbonulo estis alkondukata katenigita laŭdeve. Jen laŭdire lastan favoron li petis t. e. tian: havi la permeson, ankoraŭ unu fojon antaŭ la morto surigi sian batalĉevalon. Oni permesis tion al li. Sed apenaŭ la kavaliro estis surĉevaliĝinta kaj iom ludraj-dinta, jen ankoraŭ jam antaŭ la okuloj de la magistratoj kaj de la amaso, pro mirego konsternita, li transiĝis la larĝan kaj profundan antaŭkuŝantan urban foson, de kies transa deklivo facile li sukcesis atingi la liberejon kaj foriĝi al sia kastelo. Sed al la Nürnberg'anoj tiu ĉi mirakla okazintaĵo laŭdire havigis la ofte citatan mokdiron: „La Nürnberg'anoj neniu pendigas antaŭ ol havi lin.“ Nature la tuta afero estas elpensajo. En la realeco la historia Epplein, kune kun kelkaj siaj nobelaj kunuloj proksime de Nürnberg kaptita, por averti alian rabistaron, per la rado estis ekzekutata (1381).

Timiga dokumento de homaj barbareco kaj kruelleco estas la same sur la kastelo lokita „turmentegilejo“, kiun la fremdulo malgraŭ timremado malofte preteriras. Nur el la 19-a jarcento devenanta fondo, ĝi enhavas sufiĉan amason de iloj, skribaĵoj kaj bildaj prezentaĵoj, returnen datantaj al la tempo de plej malĝoja justeco, kiam ankoraŭ la hispana inkvizicio regis en germanaj landoj. Specialaĵo estas terura mortiginstrumento, i. a. montrata tie kaj atinginta certan famon: la fera virgulino. Ĝi havas la formon de honorinda matrono el la 16-a—17-a jarcentoj kun dense surigita kufo kaj rigida krispa kolumo, la brakojn kaj manojn kaŝantaj en glate malsupreniĝanta vesto, kian tiam kutimis surhavi la Nürnberg'aj sinjorinoj. La mantelo de la figuro estas ligna; se oni malfermas ĝin, en la interno ĝi sin prezentas legita per terura ferajo kaj pikiloj, pretaj por trabori kaj dispecetigi sian viktimon kiun oni konfidis al la brakoj de tiu ĉi monstro. Reale tiu ĉi mistera turmentegajo estas faritaĵo de la 19-a jarcento, entuziasmiĝanta en ilmiga romantiko. „Fera virgulino“ neniam ekzistis. Tia malsimpla kaj ruzega kruelleco, kian kondiĉas tiu ĉi instrumento, ankaŭ tute ne estis karakterizaĵo de la Nürnberga magistrato, kiu eĉ mildigis kaj nulligis diversajn kruelajn mezepokajn punojn.

Sed for de tiuj ĉi neĝojigaj bildoj al pli humora, ankaŭ havanta permeson esti konsiderata Nürnberga specialaĵo! Certe ĉiuj jam aŭdis ion pri la „Nürnberga funebro“, kiun laŭŝerco oni atribuas al iu aŭ rekomendas aĉeti, se ion: li estas malinteligenta. La es-primio devenas de libro kun la titolo: „Poezia

funebro, aŭ: Por enŝuti la germanan poetan kaj riman arton senhelpe de la latina lingvo dum 6 horoj.“ Tiu ĉi titolo, respondanta al la gusto de la tiama tempo, hodiaŭ certe nin tuŝas tre komike, kaj ni komprenas la mokon, alĝintan al tio. Verkinto de la libreto, aperinta 1646 en Nürnberg, cetere sufiĉe dika, estis la patriocio Filipo Harsdörffer, kiu akiris meritojn rilate al purigado de la germana lingvo je fremdvortoj.

Malsuprenirante la deklivan kastelan monton, tiuj ni atingas la spacan foirejon, unu el la plej belaj placoj de la mondo, kiu en la tielnomata diabla ringo ĉe la bela puto prezentas multe atentatan legendumitan vidindaĵon. Neniu homo, ankaŭ ne fakulo hodiaŭ plu povas klarigi al si, kiamaniere tiu orumita fera ringo, kiu libere estas movebla, povis esti enigata la ferfanditan krandon: Sufiĉe da kaŭzo, ke la legendo tuj la diablon mem rilatigis al ĝi. En la realeco tio estas unu el la kutimaj metiaj in-signo, kiujn ofte malproksimen vojaĝintaj me-tiistoj en malnova tempo vidlernis en la fremdlando kaj reveninte en la gepatran urbon prezentis kiel pruvon de sia lerteco.

Kontraŭe de la bela puto sur la frontona turo de la preĝejo de nia Sinjorino troviĝas la ĉie konata „Männleinlaufen“ (kurado de hometaj figuroj), kiu deantikve speciala vidindaĵo, estis konsiderata kvazaŭa ekkonilo de la urbo. Tio estas unu el tiuj ŝatataj ludhorloĝoj, kaj i. a. estas troveblaj en Praha, Strassburg, Olmütz kaj Bern; nur kun la diferenco, ke ĉi tie pruveble oni havas antaŭ si la plej malnovan tiaspecan artefaritaĵon. Estiĝinte jam ĉirkaŭe je la mezo de la 14-a jarcento, ĝi estis pensita kvazaŭa ovacio por imperiestro Karlo IV-a, kiu en Nürnberg 1356 eldonis la famekonatan imperian leĝon de la „ora dekreto“. Laŭ tio la kurado de hometaj figuroj prezentas la sep princo-elektistojn, kiuj jus riverencas la germanan imperiestron. Kiam batas la 12-a horo tagmeze, ili elvenas el sia malluma ĉambro, heroldo antaŭe, ceremonie kun solene mezuritaj paŝoj ĉirkaŭirante la imperiestron, kiu en la centro de la surkonstruaĵo sidas sur la trono kun scepro kaj imperia globo en la manoj. Tiu ĉi spektaklo trifoje ripetigis, dum sonoretas en la horloĝa turo sonorileto kaj du viroj per marteloj batas sonorilon trovigantan sub tio. Ĉio ĉi tio por fremduloj kaj enlandanoj, speciale por infanoj, estas objekto de grandaj ĝojoj kaj ravo, tiel ke ofte, speciale dum la vojaĝa tempo, la tuta foirejo estas plena je rigardantoj. Kiu vizitis Nürnberg'on, nepre ankaŭ devis rigardi la kuradon de la hometaj figuroj.

Tio do estas kelkaj specialaĵoj de Nürnberg. Certe ankoraŭ multo alia estas citinda. Sed sufiĉas al ni, atentigi pri la Nürnbergaj melaĵkukoj, kiujn oni jam volonte mencias en la meza

epoko, kaj por kiuj la Germana Muzeo posedas nombron da tre malnovaj tielnomataj „Holzmodel“ (lignaj modeloj), servantaj por formi la plej diversajn figurojn el la bongusta faruna kaj mela maso. Finante ni mencias krom tio la Bratwurstiglöcklein (restoracio por rostitaj kolbasetoj), malgrandan, tre malnovan dometon, kiu kvazaŭ algluita al preĝejo, estas la kutima trinkejo de Johano Sachs, Albrehto Dürer kaj de aliaj famaj Nürnberganoj, kaj feliĉe postdaŭris la malfavoron de la tempoj. Tie krom bona Nürnberga biero oni ricevas la mikroskopajn sed delikatajn rostitajn kolbasojn kun acida brasiko, formantajn la raven de la fremduloj kaj urbanoj. Tien niaj legantoj, veninte Nürnbergon, jam scios trovi la vojon. Sed volonte ni finas per tiu ĉi apetitiva prezentado.

Nürnberg en la laŭdoj de la jarcentoj.

De Richard Ledermann.

Ei ĉiuj germanaj urboj Nürnberg estas la plej gloriata kaj glorata. En Germanlando mem, transe de la landlimoj kaj de la oceano Nürnberg ĝuadas bonfamon, kaj fremduloj ĉiulandaj malkaŝe esprimis sian admiron, disportante ĝin ĉiujmonden kaj pligigante ĝian gloron, proze kaj poezie.

La granda rolo de la urbo rilate al komerco kaj industrio, arto kaj scienco, la granda nombro de eminentuloj kaj majstroj en la plej diversaj kampoj, la ofraj vizitoj de la imperiestroj al la kastelo kaj urbo mem, la originalega, antikva, speciale artistojn raviga karaktero, la nimbo de multaj strangaj fabeloj kaj legendoj: ĉio tio forte instigis scienculojn kaj poetojn por priklari ties gloron, ĉu en latina, ĉu germana ĉu aliajlanda lingvoj.

La multvojaĝinta doriotta itala humanisto Eneas Silvias, la posta papo Pio II-a, jam en mezo de la 15-a jarcento entuziasme raportis: „Kiam oni venas de suba Franklando, el malproksima la belega urbo prezentigis en vera majesto, pliĝanta ankoraŭ post trapaŝo de la pordegoj, per beleco de la stratoj kaj per gracieco de la domoj. La katedraloj de Sankta Sebald kaj Sankta Lorenzo estas respektindaj kaj belega, la imperiestra kastelo aspektas fiera kaj firma de supre. La kastelaĵoj ŝajnas konstruitaj por princoj; vere la reĝoj de Skotlando opiniis sin feliĉaj povante loĝadi sambone kiel la burĝoj Nürnbergaj. Nenio pli belega, nenio pli vidinda estas retrovebla en tuta Eŭropo.“ — Konrad Celtis, la fama humanisto kaj kronika poeto, verkis latinlingvan traktaton pri deveno, situacio, moroj kaj institucioj de Nürnberg, kiu enhavas multan laŭdon pri la urbo. Ofte citita estas speciale la strofo:

„Bone atentu, leganto, Nürnberg'on prefere lokitan,
Koron de Germanland', koron de Tutetrop'!
Kie kaj kiam sur globo vidigis io simila:
Humo aterita kaj jen, tamen, mirinda kreskad'.“

Samlaŭde mencias ĝin la reformatora sciencisto Filippo Melancthon skribante: „Nürnberg estas la lumo, la okulo, la ornamo kaj la plej bela juvelo de Germanio“. Je festa okazo li faris eĉ la eldiron: „Nürnberg estas la germana Firenze!“ Kaj Eoban Hesse samokaze profetis: „Via laŭdo, ho aliaŭdata urbo, via vasta glorigo tiom longe daŭros, kiom la ondoj de Pegnic fluados sur malfirma sablo“. Erasmo de Rotterdam fine danke rememoras la gastaman restadejon en letero al Nürnberga amiko: „Mi ĉiam plej kontenta estis pri via urbo, kiu glorie superas ĉiujn germanajn“.

Ankaŭ germanlingve alt- kaj malatranguloj konsentis tiun laŭdon. Imperiestro Karolo IV-a jam 1366 nomis Nürnbergon la plej nobla urbo de la Imperio, kaj D-ro Martin Luther ripete gloris la urbon dirante: „Nürnberg estas la okulo, la orelo de Germanio“.



La Kastelo, vidata de okcidento.



La Muzeo-Ponto.

Kiel unua nacilingva poeto Walter von der Vogelweide, meze de la 13-a jarcento, glorie menciis la urbon. Ke la majstrokantistoj de Nürnberg ne forgesis laŭdadi ĝiajn preferojn, estas komprenebla. Unuanime ili prikantis ĝiajn belecon, riĉecon, potencon kaj arton, same la saĝecon de la urbestro. Vastkonata estas speciale la poemo de la brava ŝuisto-poeto Hans Sachs, kiu komparas sian gepatran urbon al floranta rozeto kaj finsonigas sian laŭdajn patriote per la populara rimaĉo:

„Ke floru, kresku via nomo,
Deziras Sachs, la Nürnbergano.“

Silentigis ja poste la muzo, kiam la militoj de la 17-a kaj 18-a jarcentoj alportis al la urbo terurajn mizeron kaj suferojn. Sed refortiginte en la komenco de la 19-a jarcento, Nürnberg tuj retrovis kantemajn poetojn, kiuj superŝutis denove la urbon per laŭdajoj. Kaj vere, kiu vera poeto, vidante tiun admirindan „testamenton de germana mezepoko“, ne sentus la neelĉerpeblan ĉarmon de la althonora urbo? Prave prikantis ĝin interalie Max von Schenkendorf, kiun forte impresis tiu kernpunkto de germana esenco, vivo kaj arto:

„Neniam Germanujon
Ekkonos, amos vi,
Sciante ne Nürnbergon,
Altiara estas ĝi.
Vin ĉiam oni laŭdas
De Germanlando aks,
Ho urb' de majstro Dürer,
De la kantisto Sachs.“

Trafe prikaŭtis ankaŭ la artamanta romantika bavara reĝo Ludoviko I-a la „juvelojn de Germanlando per la strofo:

„Nekomparebla Nürnberg,
Sopirmildiga ŝild',
Mirinde la pasinton
Spegulas via bild'.“

Indan dokumenton faris fine al la urbo Richard Wagner en siaj „majstrokantistoj“, dirante:

„Kiel paca kaj bonmora,
Ĉu en faro ĉu en verk',
Kuas meze en la lando
Mia kara Nürnberg!“

Sed ne nur germanaj poetoj esprimis entuziasme sian admiron. Ankaŭ eksterlandaj verkistoj kaj poetoj, vidinte la ĉarmojn kaj belajn de la urbo, ekkantis Nürnbergon poezie kaj proze. El multaj mi citas nur la belegan poemon de la amerika poeto H. W. Longfellow, kiu enhavas la karakterizan strofon:

„Urb' de l' arto kaj de l' kanto,
De l' trafiko kaj laboro,
Ĉirkaŭflugas viajn pintojn
Mezepoka rememoro,
Kiam tronis en kastelo
Multcentiara, tempoapita
Imperiestroj multnombraj —
Ho vi tempo glorumita!“

Tiel tra jarcentoj Nürnberg ĉiam denove estas glorita kaj festita pro ĝiaj belajoj. Vere, ankaŭ nuntempe la urbo montras ankoraŭ la originalan karakteron de glora pasinteco, plena de riĉeco, potenco kaj arto. Estas urba bildo, entuziasmiga antaŭ artistojn kaj poetojn kaj ĉiun altsentulon, bildo nente retrovebla en la mondo.

Hans Sachs.

Nürnberg estas unu el la plej belaj kaj revemaj urboj de la mondo. Sankta, arta restaĵo, kiun Germanujo konservas pie apud siaj fabrikaj urboj kaj apud siaj monumentaj urboj, grandaj lumturoj de moderna vivo.

En ĉiama jarcento la dia muzikarto estis forlasata de nobeloj kaj kavaliroj, kaj ĝi fariĝis preskaŭ ekskluziva apartenaĵo de laboristoj kaj metilistoj, kiuj fondis artajn societojn; inter ili estis la plej fama la rondo de la tiel nomataj »majstrokantistoj«. Ĝiaj konkursoj okazis en Nürnberg, tiu revema urbo, aminda por artistoj. Tie, per frata kunigo inter mana kaj intelekta laboro, rejniĝis dank' al potenca popola spirito la arto mortanta en palacoj kaj reĝaj kortoj.

Unu el la plej glori kaj kantiistoj dum tiu bela jarcento estis Hans Sachs, Nürnbergano botlito, kiu karesis per laborokutimigintaj manoj la dolĉegan

aldviolonon, de l' kavaliro Tannhäuser, kaj ludis ĝin kiel inspirita trubaduro. Nek martelo nek ledkutobilo kapablis malfortigi la romantikan animon de tiu artisto.

Lerte konstruante ŝuojn, li verkadis versojn kaj elpensis ŝercaĵojn kaj kantis kantojn; kaj virinoj, muzikistoj kaj poetoj lin admiris, la ĝojon de l' urbo. Wagner igis senmorta tiun noblan botliston kaj la Historio lin nomas apud reĝinoj, artistoj kaj imperiestroj.

Mi mense metas tiun metiliston apud aliajn modernajn altrangulojn, kiuj progresigis la Arton kunigante ĝin kun popola kreadopotenco; kaj mi pensas kaj revas pri estonta ora epoko, kiam tiuj popolamasoj — nuntempe sklavoj de la laboro kaj trinkejo — reaktos la spiriton, per kiu Grekulo kaj Germanujo fariĝis tiel kulturaj kaj glori landoj.

Oni enradikigu en la popolojn amon por beleco, dolĉan emon por floroj, muziko, poezio kaj ĉiuj artoj, kreu amon por la Naturo, senton por esteikaj idealoj kaj samtempe disvastigu ideojn kaj sociajn konojn, per kiuj vekigu la popola intelekto kaj moliĝu la popola koro. Ne sufiĉas Instruo, oni bezonas Edukon. Seka instruo kondukas al la malviva litero de libroj kaj ĝi formas nur fiksaln pedantulojn pro eraraj ideoj, pro venĝemaj doktrinoj kaj malamoj.

En niaj latinaj landoj, kie klimato kaj Naturo malfermas la intelekton kaj vivigas la fantazon, kial tie Ario estu aparta privilegio de riĉuloj aŭ senokupuloj? Kial laboristo en fabriko, ĉarpentisto aŭ forforĝisto en metiejo aŭ ĝardenisto en ĝardeno ne kulturu estetikajn sentojn anstataŭ dediĉi sian libertempon al drinkejoj aŭ diboĉejoj? Kial homoj fondantaj nesanan aŭ neutilajn societojn por malbonmora uzado, aŭ homoj devojigantaj intelektulojn per filozofiaj sofismoj, ne fondu societojn kiel tiujn Germanujon, kiuj per superaŭtuleco kaj superululeco aŭ ferforĝisto en metiejo aŭ ĝardenisto en ĝardeno ne kulturu estetikajn sentojn anstataŭ dediĉi sian libertempon al drinkejoj aŭ diboĉejoj? Kial homoj fondantaj nesanan aŭ neutilajn societojn por malbonmora uzado, aŭ homoj devojigantaj intelektulojn per filozofiaj sofismoj, ne fondu societojn kiel tiujn Germanujon, kiuj per superaŭtuleco kaj superululeco aŭ ferforĝisto en metiejo aŭ ĝardenisto en ĝardeno ne kulturu estetikajn sentojn anstataŭ dediĉi sian libertempon al drinkejoj aŭ diboĉejoj?

Kial ne multobligeblas dramaturgoj, horoj kaj popolteatroj anstataŭ drinkejoj kaj fidancejoj? Mi kredas profunde je l' Arto. Mi kredas, ke ĝi estas karaktero povas kunhelpi al eduko de popoloj kaj fariĝi risorto por la progresado de patrujo; mi kredas, ke ekonomia scienco kaj ŝtataj leĝoj kaj sciencia evoluo povus sin apogi sur popola arto, sur estelika kulturo de la laboristaro. Libera, kulturita kaj arta popolo estas desideratum de plej bona sociologio.

Imagu hejmon modesta kaj pura kiel ora vejno, kie ĝojo kaj gusto anstataŭas lukson kaj riĉecon, kie arto vivas kaj plenigas ĉion per floroj kaj suno. Imagu botliston kiel tiu en Nürnberg, kiu kantas kaj verkas versojn kaj eldiras ŝercaĵojn kaj galigas sian laboron laŭ la ritmo de l' martelo fikse kalkanumon al belaj botetoj de virino, eble de sia amatino...

Venu baldaŭ tia ora epoko, kiam Arto, popolfilo, reiros al la popolo kiel dia donaco, por suprenleviĝi per agla potenco en ĉielan serenecan.

El la hispana originalo de la glora, nuntempa verkisto Ricardo León, tradukis Feliks Diez.

Saluto el Lodz.

Dediĉita al la XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

Gesamideoj de tuta la mond',
Akceptu saluton de Lodza la rond'.
Akceptu sinceran saluton el kor'.
En kiu nacia malam' estas for.
Fervore batalas ni por Esperant'.
Kaj laŭte jam sonas ĉe ni paca kant':
Neniu malhelpo aŭ bar' venkos nin;
Kuraĝe ni iros antaŭen ĝis fin'!
Kaj alte ekflirtos standarda verdstel'.
Tenata de ni sub la Lodza ĉiel'.
Kaj scios popoloj kaj tuta mond', ke
En Lodz batas koroj por paca l' ide'.
Por nobla l' ideo kaj granda cel': per
La lingvo la paco ekregu surter'!



La Ekzekutisto-ponteto („Henkersteg“).

Eppelein von Gaillingen.

De D-ro Otto Kleider.

Por kio tiuj ĉi muroj kaj turoj, tiuj ĉi lumoj kaj aeron barantaj ŝtonamasoj? Tio estas diraĵo de nia tempo. Ni ne deziras ilin, ĉar ni ne plu bezonas ilin pro tio forigu ilin! Ni deziras la pacon, la liberan interkomunikadon kun la ĉirkaŭantaro sen ĉiu barilo — lumon kaj aeron! Felicia tiu tempo, kiu povas plenumi tian postulon.

La burĝoj de la pli fruaj jarcentoj certe ankaŭ ne dezirus tiun ĉi muran zonon ĉirkaŭ siaj pacemaj loĝejoj, se bedaŭre ili ne bezonus ilin. Sed kiom tio okazis, tion atestas ĉiu folio de nia historio ĝis la pli nova tempo.

La burĝaro ekflorinta dum la 13-a kaj 14-a jarcentoj kaj disvolviginta el la amaso de la metilistoj, kunigita en la urbo, ĝis la tempoj de Maksimiliano I-a kontinue bataladis kontraŭ la batalema kaj rabema Imperia nobelularo, restadanta en siaj kasteloj, kaj poste kontraŭ la pli malpli grandaj dinastioj, elkreskintoj el tiu. Jen certe estis necese, post muroj kaj turoj sekurigi sin kontraŭ la ĉikanaj kaj atakoj, deteneblaj nur per remparoj, turoj kaj tirpontoj.

Tiamaniere ankaŭ la Imperia urbo Nürnberg devis ŝperiti multajn gravajn konfliktojn, prefere kun la proksime loĝanta franca Nobellularo; inter kiu ekzistis ne malmultaj tiel nomataj „turmentuloj“. Unu el tiuj ĉi tiom precipe distingigis per siaj ĉikanadoj kontraŭ la urbo kaj ĝiaj burĝoj, ke lia nomo ankoraŭ hodiaŭ, post preakaŭ plenaj kvin jarcentoj, vivadas en la memoro de la Nürnberganoj, kaj lia tuta figuro estas konsiderata la tipo de vera rabista kavaliro, kiam ajn povis ekspendi la fantazio de filistro aŭ butikisto.

Tio estis sinjoro Apollonius (vulgare Eppelein) von Gaillingen, el la gento de la Gaillingen von Hllesheim, kiu dum preskaŭ 50 jaroj sin pravis la teruro kaj turmentulo de la Nürnberganoj. Lia genta kastelo troviĝis ĉe Rothenburg apud Tauber, kiun urbon same li turmentis pli ol unu fojon per siaj rabiroj kaj friponaĵoj, sed krom ĝi li posedis ankoraŭ aliajn kastelojn kun respektinda alaĵo je vilaĝoj, arbaro kaj kampoj, tiel ke li tute ne apartenis al la malriĉaj kavaliroj, kiuj pro sia ekzistado apud la bosco spione atendis la komercistojn kaj butikistojn, migrantajn al la foirejoj kaj foiroj. Maltrankvilulo fakte li estis, kaj batalado kaj disputo estis fluo elemento sen kiun lin povis vivi.

En la ekflorantaj urboj la nobelularo ĝuste antaŭvidis disvolvigintan potencon, kiu minacis subigi ĝin, kaj kiun pro tio el la natura instinkto de la sintrestigemo ĝi kontraŭbatalis per tiuperforto, kies praktikado tiam estis la ĉefa laboro, el kiu ĝi estis edukita, se ĝi ne preferis esti nobela servisto ĉe iu kortego. La urboj do estis la plej bona beno.

La Sinjorino-Perdego („Frauentor“).

objekto por la batalemo de la nobelaj sinjoroj, kaj per simpla batala alvoko, t. e. militdeklaro de kavaliro kontraŭ iu ajn imperia urbo, ili konsideris sin tute rajtigitaj fari ĉiun ajn malhonestaĵon en ĝia te ĉirkaŭ kaj ĝiajn subulojn premi kaj malutili.

Kavaliro Eppelein ankaŭ posedis la kastelon „Drameysel“, kies restaĵoj ankoraŭ hodiaŭ formas la postan muron de kamparana domo enkonstruita en la ruĝon, en la samnoma vilaĝo Drameysel. Laŭ la legendo laŭdire li kolektis siajn federitojn en tiu ĉi kastelo, intencante efektiviĝi tian ajn rabiron.

Pro la rapideco, ruzeco kaj malimemo, kiujn li montris en ĉiuj siaj entreprenoj, la legendo lin konsideris sorĉisto. Ekzemple foje dum luma tago li ŝtelis oran aŭ arĝentan kaĝon, en kiu oni konservis ĉiuspecajn multekostaĵojn, oron, arĝenton kaj juvelojn. Tiuj ĉi objektoj, kune kun aliaj, oni publike ekpovis iufoje dum specialaj festoj. Okaze de tia festo ankaŭ majesta kavaliro vizitis la ekspozician domon por rigardi la kaĝon. Subite en alia ĉambro ekstis laŭta disputo kaj tumulto. Ĉiuj scivole iris tien tiel ke ĉe la kaĝo restis nur la kavaliro.

Post retranskiviligo, la kavaliro estis malaperinta kune kun la kaĝo. Tiu, neniu alia ol la sinjoro „Eppelein von Gaillingen“, kaŝinte la kaĝon sub la mantelo, tute trankvile forlasis la domon, surĉevaliĝis kaj forgalopis al sia kastelo „Drameysel“. De tie li sendis al la urbestro moka dankskribiĵon, aldonante, ke la disputo komencis tri el liaj servistoj, per kio li havis okazon alproprigi al si la belegan objekton. Pro tiu ĉi malicaĵo la Nürnberganoj estis multe mokataj en la tuta imperio.

La malimemo kaj kuraĝego de la kavaliro ofte lin savis el granda mizero. Foje ĉirkaŭita jam de siaj malamikoj, de alta roko kun la ĉevalo li saltis en Majnriveron kaj feliĉe forlitis.

Fine tamen dungitoj de la urbo sukcesis kapti la malamikojn kun lia servisto Jäckel, Triumfante ili kondukis lin Nürnbergon. La plej alta tribunalo kondamnis lin al la morto. Dume oni malliberigis lin en la tiel nomatan „kvinangula turo“.

En la tago de la ekzekuto inter du vicoj de dungitoj oni gvidis la kondamniton sur la eksteran „liberejon“ de la kastelo. Jen ligita ĉe arbo li ekvidis sian fidelan ĉevalon.

„Mizera Haĉio“, ĝemis Eppelein, „adiaŭ vin, ne estas facile por mi, ho, se nur ankoraŭ unu fojon mi povus suriĝi vin, antaŭ ol ni disiĝos por ĉiam!“

„Pro mi vi faru tion“, diris la bonanima kapitano, „ĉar ankoraŭ ne estas tempo, venigi vin en la urbdomon. Pro tio surĉevaliĝu, ĉi tie ja ne estas malno, kiu povus savi vin.“

„Dankon, kapitano“, diris Eppelein, „tiun ĉi bonfaron rekompenca al vi Dio kaj faru vian mortohoron pli dolĉa ol la mian.“



La Töpler-Domo.

Jäckel, lia fidela servisto, al kiu la sinjoroj lasis la liberecon, kaj kiun ili estis envicigintaj sian dungitajn, ĉar ili intencis bone uzi la ruzegulon dum siaj militoj kontraŭ la kavaliroj kaj federitoj de Eppelein, alkondukis al li la kuraĝan ĉevalon. Fiere ĝi levis sin alen, kiam ĝia estro alproksimiĝis. Sed trankvile, kvazaŭ ŝafido ĝi stariis, kiam Eppelein la piedon metis en la piedingon kaj surseliĝis.

Multe per siaj rajdistaj artifikoj li ĝoligis la dungitajn. Sed pli kaj pli multe sian ĉevalon li direktis al la muro, de interne ĉirkaŭanta la profundan kastelan foston. Subite la ĉevalo sin levis por la salto, kaj post momento ĉevalon kaj rajdanton oni vidis flugpendantaj super la foso. Konsternitaj estis la rigardantoj, kvazaŭ paralizitaj. Sed dum la ĝenerala konfuzo post tio daŭris longan tempon, ĝis kiam fine la tirpontoj malsuprenkrakis, por ke oni persekutu la fuginton. Eppelein jam delonge estis malaperinta en la arbaro, kiam la unuaj dungitoj ilin atingis. La federitoj de Eppelein baldaŭ returnis pelis la Nürnberganojn, kaj la kavaliro senĝene atingis sian sekuran kastelon Drameysel.

Kompreneble oni opiniis, ke Eppelein povis efektiviĝi la fugon nur per helpo de la diablo kaj de malbonaj sorĉoj, des pli, ĉar kune kun la kavaliro senposisigne malaperis ankaŭ lia servisto Jäckel. La dungitula kapitano, ĉefe kulpa pro la forigo de l' kavaliro, solene juris esti vidinta, ke la ĉevalo alformiĝis fajra drako, sur kiu kavaliro kaj servisto trafugis la aeron. Aliaj, malplimulte kredantaj la intervenon de la diablo, pretendis, ke Jäckel sur balaila tenilo, kiun li apogis kontraŭ la muro, englitis la foston kaj ĉe vinbertrunko suprenrampis la alian flankon. La plej verŝajnan, ke dum la ĝenerala konfuzo kun la aliaj dungitoj li forlitis trans la tirponton, plej malmulte oni kredis.

Eppelein jam estis grandaĝa homo, kiam liaj malamikoj, unuigitaj per la komuna mizero, efektiviĝis, ke super lin kaj liajn federitojn estis ordonata la Imperiestra anatemo. La plej multaj forlasis lin, tiel ke fine nur kune la fratoj Dietriko kaj Hermano von Bernheim kaj kun malmultaj servistoj, li migris de unu kastelo al la alia kaj ne plu povis entrepreni ion gravan sur la libera militojo kontraŭ siaj malamikoj.

Fine en la jaro 1381 kun la du Bernheim'oj kaj kvar servistoj en la vilaĝo Postbauer ĉe Neumarkt li falls en la manojn de la unuigitaj urbanoj, kiuj lin transportis al Neumarkt. Tie post mallonga proceso ĉiujn kaptitojn oni kondamnis al la morto. Eppelein kaj la du fratoj Bernheim estis ekzekutataj per la rado, la kvar servistoj, inter ili ankaŭ la fidela Jäckel, per la glavo.

La kunuloj de Eppelein kaj eniute granda parto de la franca kavalaro ne konsiderantaj la severan fuĝon de la urbanoj ago de la justeco kontraŭ boscaj rabistoj sed nur perforta bato kaj ofendo de siaj kavalaraj privilegioj flanke de la „postpalaŭoj kaj pirosoj“, feris interligon kontraŭ la urboj, kaj 21 kavaliroj deklaris la malpacon al la urbo Nürnberg. La bataladoj inter la urboj kaj la nobelularo daŭris ankoraŭ longan tempon en la 18-a jarcento ĝis kiam la aplikado de la ĉiam pli kaj pli multe perfektigata kanono, kiun uzante la urbanoj fariĝis majstroj, plifaciligis la ruinigon de la kasteloj.

En la interna flanko de la urbosa muro apud la kvinangula turo de kie oni havas la perspektivon al la tiel-nomata „ajla lando“, fluganta per la arbaro kaj montoj, sur kiu stariis la kasteloj de la kunuloj de Eppelein, kio ruinoj ankoraŭ hodiaŭ ornamas la regionon, kiel ekkonilon de la fabla salto de l' kavaliro trans la urban foston oni vidas enfositaj plurajn hufoteraĵojn. Sed kvankam oni konsideras, ke la urba kaj kastela foso tiutempe estis sufiĉe pli mallarĝa ol nun, tamen estas necesa bona kredo por supoz, ke la salto fakte okazis. Legendojn pri tiaj fabliaj saltoj oni trovas pli ol unu fojon en Germanujo, kaj pro la preakaŭ mita nimbo, kiun disvastigis la sendube historia persono de l' kavaliro Eppelein von Gaillingen, estas tre klarigeblis, ke ankaŭ al li oni atribuis tian riskaĵon, kiam plenumis „Harras, la kuraĝega saltanto“. Sed la legendon pri tiu ĉi salto ankaŭ kontraŭas tiu ĉirconstanco, ke la kvinangula turo kun kune la liberejo tiutempe ne estis en la posedo de la urbo, sed apartenis al la kastelo de la kastela grafo.

Dum la XV-a okazos en Nürnberg granda Kabaretvespero subtenota de la „VERDA KATO“ (Paris).

Personoj, kiuj volas partopreni kiel aktiroj, turnu sin rekte al la aranĝonto, s-o Leopold Cuzon, Paris, 13, Rue Jean Beausire.

Por la propagando

ni liveros pliajn ekzemplerojn de la Nürnberg-numero je duona prezo

ĉe mendo de minimume kvar ekzempleroj al unu adreso. La pagon ni deprenos laŭdezire de la abonkonto. Al revidistoj ni liveros pliajn ekzemplerojn kun la kutima rabato je la duonigita prezo, ĉe mendo de ankoraŭ minimume dek ekzempleroj.

S^a Nikolao

Holandanoj!

La plej bona donaco, kiun vi povas doni al via konatulo estas bona esperanta libro el la

Centra Esperanto Librejo

's-Gravenhage, Bankastraat 2-a

Kristnasko